


DUMONATA KULTURA INFORMILO KAJ ESPRIMILO

Redaktejo : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE

Unu n-ro : 10 FF. Unujara abono : 60 FF ĝirotaj al

CERCLE AMICAL ESPERANTISTE pĉk 3371 74 M Bordeaux

(mencii same sur bankĉekoj!) Nia tel.: 53 95 40 26



KONTRAŬA

FAJRO



(oo)(oo)

En la somero 1943, helpe de amikara ĉeno, fuĝinte for de Parizo, mi vivis preskaŭ kaŝe en sudokcidenta franca regiono. Franclingve, tiu loko nomiĝas "Landes", kio signifas "erikejo", ĉar antaŭ ducent jaroj sur tiu marĉa ebenaĵo kreskis nur erikoj. La nomo daŭras nuntempe kvankam la ebenaĵon kovras bela, vasta pinarbaro. Estas konate, ke la suko de tiuj arboj entenas la flamiĝemajn terebintoleon kaj rezinon. La atmosfero de la arbaro enhavas oksigenon kaj terebintan vaporon, do brulaĵon kaj kunbrulaĵon; mankas nur temperaturo sufiĉe alta por kompletigi la idealan triangulon kaj ekfajrigi la arbaron. Somero aŭ milito ne malhelpas tiun triopon.

La unuan ripozdیمانĉon, posttagmeze, hurlado de fajf-ilego tiris min el mia ĉambro. Najbaro mia tuj klarigis, ke tio ne signifas avian alarmon. Tio signas fajron en la arbaro kaj vokas homojn por helpi la fajrobrigadeton de la vilaĝo estingi la incendion. Savi arbaron, savi homojn

en danĝero? Mi tuj volontuliĝas! Senhezite mi enaŭtigas kun kelke da vilaĝanoj.

La veturilo, ia ŝarĝaŭto movata per elligna gaso, ruliĝante sur sablovojoj, malrapidas kaj ebligas al mi observi miajn novajn kunulojn. Mi miras pro tio, ke ili tiom malmultas... Mi kuraĝas alparoli mian najbaron pri tiu fakto. Tre afable li respondas, ke vilaĝanoj tediĝas pro tiuj okazaĵoj. Li mem nevoleme alvenas. Lin kaptis la ĝendarmoj en la kinejo. Aliaj, pli rapidaj ol li, fuĝis el la salono, ek-aŭdante la alarmsignalon, antaŭ la veno de la ĝendarmoj. Kiam mi diris: "Mi venas tute libervole", li mokis mian ridindan naivecon.

La fajrego finfine! Grandioza spektaklo! Ruĝa maro el altaj flamoj muĝante supreniras al la nigra ĉielo; vorante fierajn pinarbojn, ili postlasas nur plorigantajn skeletojn. Nenia homa forto kapablas per si mem haltigi la avancon de la brulado, ene de la arbaro. Sur alia tereno ni devas ĝin atendi, ĝin ataki kaj venki.

La ĉefo de nia grupo ordigas nin laŭlinie, sur senarba ebenaĵo, tie kie kreskas nur herboj, veproj, arboj. Mane ni nudigas longan strion da tereno, inter la brulanta fronto antaŭ ni kaj alia parto de la arbaro malantaŭ tiu, kiun ni devas protekti. Estas kvazaŭ limo inter la parto oferita al la fajro kaj la savenda parto de la arbaro. Per branĉoj aŭ per speciala ilo similanta feran voston de pavo fiksita je ekstremo de longa lignostango, ni pretiĝas malhelpi la fajron trapasi tiun limon.

Tiam okazas ago tute nova por mi. La fajrobrigadestro mem tutvole ekbruligas herbon laŭlonge de la strio, kaj tiu nova fajrolinio iras renkonte al la alia, kiu, puŝate de la vento, venas al ni. Nia laboro egiĝas: ni devas kuri de ĉi tie tien por frapi la trapasantajn flamojn. Miaj vizaĝoj kaj manoj varmegiĝas pro la proksimeco de la flamoj, vestaĵoj kaj ŝuoj miaj difektiĝas, mia koro duonrompe batigas, mi preskaŭ sufokiĝas.

Eknoktiĝas. Ne gravas. Mi multe lernis pri pinarba fajro kaj homa sintenado!

Kiam nia kontraŭfajro direktiĝis al la malamika fajrego, tio, kio plej profunde impresis min, malgraŭ densa fumo,

en tiu granda subĉiela salonego, estis, ke ni vidis Davidon kaj Goliaton batalantajn antaŭ ni.

Fajro luktis kontraŭ fajro, ĝis kiam nenio plu nutris ilin. Tiam la incendio finiĝis per si mem.

Elĉerpitaj, brulvunditaj, malsataj, soifantaj, ni sentis nin kunligitaj per komunaj strebado kaj sufero, feliĉaj pro la venko: la nano triumfis super la giganto, per ruzo kaj senlaca penado.

Jaroj pasis. Esperanton mi lernis, kaj venis al mi penso: voranta lingvo usona per favora ventego minacas la lingvaron, sed eta lingvo kapablas savi la aliajn lingvojn kaj kulturojn, same kiel fajreto savis la arbaron de la atako de la fajrego, naskante sian propran venton.

!! AŬDACU ESPERANTO N!!

!! ESPERANTO AŬDACU !!

Verkita de la esperanto-klubo de Pau (F), laŭ ideo de J. Deko



LA ILUZIOJ KAJ LA REALAĴOJ

Ĉiuj homoj havas esperojn, kiuj ofte fariĝas iluzioj fronte al la realaĵoj, ĉefe en politiko kaj religio. Nun mi intencas paroli pri politiko, pli ekzakte pri politika ekonomio.

Kio gravas por ĉiuj? Bona administrado de ekonomio, tiamaniere ke ne estu mizero, senlaboreco, fuŝa ekonomio, troa ekspluatado, ŝtelekonomio. Pri tio ĉiuj revas, eĉ sopiras. Oni opinias: Nun estas pro kapitalista ekspluatado en okcidentaj landoj, estas koloniista ekspluatado en la triamondaj landoj, ktp... sed morgaŭ estos la revolucio, la sendependigo, ni starigos paradizon surtere. Teorie, nenia problemo, ni kaptos la potencon per pafilo aŭ alimaniere, kaj tiam faros kion ni deziras.

La realo estas tute alia pro diversaj kaŭzoj. La politikistoj estas ambiciuloj, ofte malhonestaj kaj tute ne kapablaj realigi siajn promesojn. Ankaŭ la popoloj ĝenerale ne kapablas. En Tria Mondo estas alta procento da analfabetoj (de 60 ĝis 90 %). Ĉiukaze mankas teknikaj kapabluloj, ktp. La revolucio aŭ la sendependigo ruinigas la landon kaj forpelas grandan parton de la kapabluloj. La rezulto estas, ke apenaŭ la libero estas starigita,

la politikistoj kreas revolucionan tribunalon, sekretan policon ktp. por trudi siajn decidojn. Paralele la ekonomio fiaskas, ĉar malbone mastrumata. Oni ne povas transiri de mezepoka, de prakapitalisma ekonomio al moderna socialismo en nura momento. Oni ne povas transiri de 500 jaroj da malfruo al formo de ekonomio, kiu nenie ekzistas. Ĉu iu kapablas diri al mi landon, kie socialisma, komunisma ekonomio funkcias praktike kaj taŭge nun? Certe K. Marks teoriumis la socialismon, sed por transiri al vera socialismo kaj praktiki ĝin reale, estas multe da praktikaj problemoj solvendaj, eĉ en la plej modernaj landoj.

Kompreneble, en Tria aŭ Kvara Mondo aŭ en lando ruinigita per milito aŭ revolucio, estas multe pli da problemoj, ne sufiĉe da kapabluloj, teknikistoj ktp., sed ankaŭ ĉio aŭ preskaŭ ĉio estas konstruota: urboj, vojoj, lernejoj, hospitaloj, fabrikoj. Ankaŭ mono necesas, ŝparita aŭ ne. En tiuj regionoj ĝenerale agrikulturo estas en la manoj de mallertaj kamparanoj. Ekzemple, en okcidentaj landoj, ofte malpli ol 3% da kamparanoj pli ol sufiĉas por nutri la tutan popolon. En Sovetio 17% el la laboristoj ne kapablas bone nutri la loĝantojn. En Afriko ofte 60% kaj pli el la laboristoj ne kapablas bone nutri la loĝantaron. Ekzemple, en Kamerunio 63%, en Mozambikio 70%, en Madagaskaro 75%. Ekster Afriko, Hindio 63%, Ĉinio 61%. (Laŭ **Atlaseco**, eldono 1989, Parizo). Kial? Ĉar ili laboras per antikvaj prametodoj.

La urbanoj ĝenerale opinias, ke ĉio kreskas per si mem, sendube, sed tio multe pli produktas, kiam oni produktas taŭge (ofte ĝisdekoble). Krome, kedu min, estas ege malfacile eduki, trejni tutan loĝantaron al uzado de modernaj metodoj. Tio ne estas afero de 10 aŭ 20 jaroj, sed de pluraj generacioj. Tio postulas eĉ 100 jarojn. En la francaj kolonioj ni elspezis multe da mono kaj sendis multe da teknikistoj por progresigi la kamparanojn, sed kun malgranda, malrapida sukceso. Post 30 jaroj da sendependeco, granda parto de niaj klopodoj vaniĝis. El 70 jaroj da laboro, kiom restas 80 jarojn poste? Eĉ kiam ne estas revolucio, la nacismo postulas, ke la eksterlandaj teknikistoj foriru. Plejmulto el la enlandaj teknikistoj foriras labori eksterlanden aŭ por internaciaj organizoj: F.A.O., UNESKO, W.H.O...., kie ili ricevas bonan salajron rilate al siaj kapabloj. En la propra lando ili estas ekspluatataj de la koruptita registaro, kiu ĉiukaze ne kapablas pagi ilin korekte.

En Francio ŝtatfunkciuloj, kiuj havas gravajn respondecojn kaj estras aŭ laboras en grandaj servoj, estas tre kvalifikitaj. Oni

postulas de ili diplomojn, konkursojn por rekruti la plej kapablajn. Poste ili estas notataj kaj ilia promocio dependas de la valoro de ilia laboro. En Tria Mondo oni rekrutas ĝenerale diplomitajn personojn, sed poste la promocio estas kamarada aŭ familia afero. En landoj kiel Sovetunio kaj aliaj unupartiaj landoj, la promocio dependas ĉefe de la aniĝo al la partio. En tiaj kondiĉoj la ŝtatfunkciuloj aŭ migras aŭ restas, sed tiam ili malmulte laboras. Ili estas pli okupataj prepari la monatfinojn, ofte per koruptado. La pordistoj vendas ia formularojn al la malkleruloj, dum inĝenieroj ricevas ŝmirmonon de aferistoj. Ne konfuzu, tio okazas ankaŭ en okcidentaj landoj, sed tio estas la faro de politikistoj, ne de ŝtatfunkciuloj, aŭ ege malofte, kaj ĝenerale tio finiĝas malbone por tiuj lastaj. En Tria Mondo tio estas komuna afero. Pro tiuj kaŭzoj kaj multaj aliaj, tiuj reĝimoj fiaskas, la landoj stagnas, ofte malprogresas.

Sed tamen ĉe la komenco ĉiuj revis pri plibona mondo, sen ekspluatado, sen milito, ktp. Same kiel niaj etnonaciistoj povas revi pri paco kiam la nacioj multnombriĝos, bedaŭrinde okazos la malo. Aliparte, pro la neceso de la progreso, necesas ĉiam novaj modernaj fabrikoj kiuj multe kostas, la etaj landoj ne kapablas prosperi, ili ne havas sufiĉe da riĉofontoj, da eblecoj selekti sufiĉe da kapabluloj, da scienculoj ktp. La supereco de Usono fontas el ĝia vasteco. La malavantaĝo de Eŭropo estas ĝia dispartiĝo en multe da nacioj, kun lingvaj baroj, rivalecoj, konkuradoj ktp; ili estas tro malvastaj. Ni bezonus la Unuigitajn Socialistajn Ŝtatojn de Eŭropo; necesos ankoraŭ pli ol 50 jaroj por trafi tiun celon. La Eŭropo de la nacioj ne estas vivpova.

Alia revo, kiu mirigas min, estas anarkiismo, aŭ senŝtata organizo. Mi multe legis la anarkistajn aŭtorojn, ĉefe: Sebastien Faure, Kropotkin, Malatesta ktp. Sed mi ne komprenas kiel la socio povus organiziĝi, ĉefe la moderna socio. Laŭ mi ŝtato estas necesa, eĉ se nur por organizi, harmoniigi la disvolviĝon. Mi ne konceptas disvolviĝon en ĥaosa situacio sen planado, organizado fare de kapabluloj. La kompetenteco de ĉiu estas limigita, necesas ke la plej kapablaj pripensu, planu la komunajn aferojn. Ni ne povas dependi de la bonvolo, de la fantazio de milionoj da senpripensuloj kaj mensaj stranguloj. Eble, teorie anarkio estas belega, sed praktike kiel tio funkcias? Mi konsentas, ke ne plu estu politikistoj. En la kolonioj antaŭ 1945, la lando estis administrata de funkciuloj: administristoj, teknikistoj ĉiuspecaj. Tiuj funkciuloj faris konscie sian laboron kaj la lando iom post iom progresis, mal-

graŭ ke ne estis politikistoj.

Ĉiukaze, en politika ekonomio kiel en sciencoj, teorioj, hipotezoj estas utilaj, sed ili devas esti provataj, eksperimentataj. Oni ne transiris de la teorio de la ondoj de Herz al televido subite, necesis multaj studoj, provoj, eksperimentoj, multe da tempo. Evoluo estas malrapida kompare al la homa skalo.

Konklude, mi prezentis skize miajn vidpunktojn pri diversaj temoj rilate al politika ekonomio. Kompreneble, tio estas diskutenda, kritikenda, kaj ĉiukaze tio nenion ŝanĝos al la malrapida evoluo de la socio. Estas nur pro la plezuro diskuti. Mi konscias, ke multaj temoj estos malakceptataj de iuj, ĉefe pri Sovetio, kiun mi tre malbone konas. Kaj eble la anarkistoj pruvos, ke mi tute eraras, ke miaj konceptoj pri anarkio estas tute fuŝaj.

J. DEKÉR

Lina Gabrielli :

AKTORO

*Mankis en albumo
de mia vivo
aktoro.*

*Mi nun konas
ankaŭ*

tian homon.

*Li recitis por mi
en hejma salono.*

*Kaj mi estis
antaŭ li*

la nura spektanto.

li ludis ĉarme

*kaj tiel donis
momentan feliĉon.*

Ho, kiel bone

al mia animo

*pro paŭzo de senĉesa
doloro!*

Antonia Apollo

(Tallinn)

*Mia hejmo - mia reĝlando,
kie mi loĝos ĝis fino.*

*Ne havas mi kronon kaj la
rubandon,*

sed mi estas ĉi tie reĝino.

*Surmetante negliĝan mantelon
el griza silko buntflora,
mi iras el ĉambro en kuirejon
kaj reen, senkapdolora.*

*Jam delonge mi revis pri tio,
ke estus bone vivi libere.
estu dankita Eterna Dio, -
mi estas feliĉa! Vere.*

9.XII.1990

O.P. :

LA DISDONA EKONOMIO

LA EKONOMIAJ DOKTRINOJ

KIEL PROGRESADI?

J. DUBOIN proponis interesan solvon, sed malfacile enkondukeblan. Tamen eble oni povus inspiriĝi el ĝi por starigi socialisman sistemon, kiu estus malpli diktator-eca ol tiu en Sovetio, sed ne reformisma kiel tiu de la socialistaj partioj en la kapitalismaj landoj, do vere revolucia. Mi opinias, ke devus plu daŭri iom da merkata ekonomio : la etaj entreprenoj, metiistoj, etkomercistoj, agrokulturistoj, ĉu individue, ĉu kooperative mastrumataj. Iliaj enspezoj estus laŭ kvanto kaj kvalito de la produktitaj varoj aŭ de la servoj efektivitaj. Ili povus aktivi ankaŭ laŭ kontraktoj subskribitaj kun iu el la kolektivoj. Por ricevi rajtojn al sociaj servoj kaj asekuoj ili devus pagi kontribuon. Jam en la socialismaj landoj (Sovetio, Ĉinio) okazas movado al tiu celo per pli libera aktivado de individuaj, kooperaj entreprenoj, laborbienuloj, etkomercistoj. La sociaj instancoj zorgus nur pri bonaj honestaj aplikoj de la intersanĝaj reguloj aŭ pri kontraktoj kun tiuj aktivuloj.

J. DUBOIN titolis sian proponon "disdona ekonomio", kiu baziĝas sur abundeco. Mi preferus "dispartiga ekonomio", ĉar temas ne nur pri disdono de enspezoj, sed ankaŭ pri dispartigo de la plenumendaj taskoj. Laŭ mi, proponante la disdonan ekonomion, oni tro simpligas la problemon. Certe la nunaj procedoj de produktado ebligis doni al ĉiu komfortan enspezon, sed restas la problemo: Kiel funkciigi, funkciigi la produktan aparaton? dispartigi la plenumendajn taskojn inter ĉiuj laborkapabluloj, tiel ke ĉiu rajtu postenon sed ankaŭ devu iun taskon plenumi? Ĉu estus iu tute potenca ŝtato, kiu rajtus ĉion efektivigi? La idealo, la principoj de socio pli egaleca,

pli justa, estas bonaj, sed eble necesus serĉi pli facile efektivegeblan manieron por ĝin atingi.

Enspezo. Pri la propono doni al ĉiu socian enspezon, oni devus precizigi kiamaniere ĝin kalkuli kaj laŭ kiu kriterio. La modernaj procedoj de produktado ebligas doni al ĉiu, laboranta aŭ ne, enspezon permesantan vivi en bona stato, eĉ komforto, Garantiitan Socian Enspezon (GSE), laŭ la entuta enspezo de la kolektivo (nacio aŭ federacio). La kategorioj, kiuj estas samtempe mastroj kaj laborantoj, ricevos laŭ kvanto kaj kvalito de la liveritaj produktaĵoj aŭ servoj, sed ili devus kotizi al socialaj asekuroj kaj diversaj publikaj instancoj. De kiam ili aktivus, ili ne plu rajtus ricevi la G.S.E. Por la dungitoj, laboristoj aŭ oficistoj, mi opinias, ke estus bone, ke oni aldonu al G.S.E. iun pluson, ekz. de 10% ĝis 100% laŭ la profesia, scienca aŭ respondeca kvalifiko. Ili havus eblecon kiel eble plej grandan elekti laborbranĉon laŭ sia lernita profesio. Se du jarojn post la fino de profesia lernado aktivulo ne trovis postenon en la lernita profesio kaj se mankos persono en ia branĉo, li ne povus rifuzi laboron en tiu fako, se ne oni rajtos malpliigi lian GSE je 25%. Daŭre li havus unuaecan rajton postuli postenon en sia profesia kategorio. Supoze, ke la GSE estus 100, oni ĝin rajtus ekde kiam oni estos 18-jara. Antaŭe, de 16 ĝis 18 : 75% ; infancoj : 50% kiel familia kromenspezo. La emeritoj ricevos 75% el sia lasta profesia enspezo. Por la geedziĝintoj, laŭ sia elekto unu rajtus ricevi GSE kiel hejma mastromant(in)o, do ne havus alian profesion taskon.

Mastrumado de dispartiga ekonomio celas kiel eble plej bone uzi ĉiujn akiritajn sciencajn, teknikajn sciojn, konojn, aplikojn, por certigi al ĉiuj kontentigon de iliaj bezonoj, eĉ disponigi al ili libertempajn agrablaĵojn. Por tio ĝi starigos planitan ekonomion, dispartigante la plenumendajn taskojn kiel eble plej ĝuste kaj juste inter ĉiuj laborkapabluloj, kaj la enspezojn, unue inter ĉiuj loĝantoj laŭ ties bezonoj, due, kun iomete pli al ĉiuj partoprenantoj al la plenumendaj taskoj, sed laŭ malgranda hierarkia aŭ profesia skalo. Oni atentigus ne fuŝi la ekologian medion, ne malŝpari la elĉerpeblajn fontojn.

Tiu planizata ekonomio estus malcentralizota, de la malgrandaj kolektivoj ĝis la kunordigaj instancoj. Unue estus la ekonomiaj kategorioj, kiuj planizados la laboron kaj la interŝanĝojn ene de tiu kolektivo kaj starigos ofic-
ejon por la interŝanĝoj kun aliaj kolektivoj. Fine estus iu ĝenerala konsilio demokrate elektita de ĉiuj loĝantoj, kiu decidus kaj atentus pri la efektivigo. Same okazos en la ceteraj instancoj. Ekzemple, en Francio : kantono, departemento, regiono, nacio.

Mono : Mi jam diris kiel mi vidas la problemon. Ĉu naci- aŭ federaci-skale oni solvos la problemon? Tio estas grava problemo. Monunuoj estus centonoj el unu de interŝanĝa valoro produktita per unu horo da labortempo.

Laboro : Taksinte la necesan labortempon por bone certigi ĉiujn bezonojn, servojn kaj agrablaĵojn, kaj nombrinte la disponeblajn laborkapablulojn laŭ la nunaj laborprocedoj, oni kalkulos kiom da meza labortempo ĉiu devos plenumi.

* * *

Kiel povus efektiviĝi tiu sistemo?

Tio postulos grandajn ŝanĝojn de la kutimoj kaj pensmaniero, oni povas diri, revolucion. La marksaj partioj diris : Sufiĉas anstataŭigi kapitalisman sistemon per socialisma, la socio fariĝos pli egaleca, justa, paca. Sed ni vidas, ke en socialismaj landoj la afero ne estas tiom simpla. Por ilin senkulpigi oni povas diri, ke ĝis nun tiuj grandaj ŝanĝoj okazis en malfruigintaj landoj. Sed la ĉefa kialo estas, ke ili ne antaŭvidis kiel eblus funkciigi la novan sistemon. En kapitalismaj landoj ili tro konstante reliefigis nur la malbonajn ecojn de tiu sistemo, ĝian ekspluatemon. Ili donis subtenon al ĉiuj laboristaj depostuloj, promesante, ke socialisma sistemo estos perfekta sistemo, socio sen ekspluatantoj kaj sen ekspluatatoj. Por ĝin atingi necesus tamen periodo de rigora laborista povo. Sed oni spertis en Sovetio, ke ne estis tiom facile funkciigi socialisman ekonomion kaj ke la rigora laborista povo estis ofte povo rigora kontraŭ laboristoj, profite al "kleraj laboristaj gvidantoj". Pro tio multaj laboristoj ne plu es-

peris socialisman solvon, des pli ke nun la plimulto ne suferas kiel antaŭe tiel akrajn vivkondiĉojn.

Kion fari? Se en kapitalismaj landoj la meznivelaj vivkondiĉoj estas pli bonaj, tamen plu daŭras, ke tiu sistemo maljuste disdonas la enspezojn, ĉefe pliigas la diferencojn, generas klason de senlaboruloj. Plu daŭras ankaŭ la stultaj elspezoj por armado, la grandaj imperiismaj potencoj subpremas la malgrandajn aŭ interbataligas ilin por disvastigi siajn influojn. Certe multaj personoj vidas tion, sed ne vidas rimedon, ne plu fidante al socialismo.

Do la ĉefa zorgo estas prezenti fidindan solvon. Mi opinias necesa iun revolucian ŝanĝon, sed oni devus pli serioze analizi la kapitalisman sistemon, kaj ne fuŝe ĝin akuzi pri ĉiuj pekoj. Ĝi estis stadio en la antaŭenirado de la homaro, kaj ĝin progresigis al pli bona sorto. Se antaŭe oni motivis socialistan revolucian propagandon cele al plibonigo de la laborista stato, nun eĉ en la salajrata klaso la plej superaj tavoloj ĝuas bonan staton, kiu ne estu ankoraŭ plibonigota. Oni devas ne trompe paroli sed celi pli ĝustan dispartigon de la enspezoj, do progresigi nur por la malsuperaj tavoloj, certigi enspezon al ĉiuj. Nur tiujn povas instigi tiu espero; la aliajn povas instigi aspiri al pli egaleca, paca, solidara socio. Estas ankaŭ ilia intereso, ĉar esperinde ĉesos la militaj konfliktoj, do la stultaj kaj malŝparaj interbuĉadoj.

Por eviti tion, kio okazis ĝis nun en socialismaj landoj, necesus antaŭvidi kiel strukturiĝos nova ekonomia sistemo, al kio celas la movado por dispartiga ekonomio. La ŝanĝo devos okazi, nur se ĝi akiros la plimulton, kaj se estos multe da honestaj sindonemaj homoj por ĝin funkciigi. Necesas ankaŭ, ke ĝi havu internacian simpatian ĉe ĉiuj progresemaj homoj, ne ebligante agresojn. Ĝi devus esti demokrateca kaj respekti liberon.

Ĉu tiu evoluo estas esperebla?

La dispartiga socialismo celas pli justan egalecan socion, uzi ĉiujn akiritajn sciencajn kaj teknikajn konojn por certigi al ĉiu vivon en bonstato kaj sekuro. La leĝdona kaj plenumanta povoj estus demokrate elektataj en granda respekto al homaj rajtoj kaj libero. La planizota

ekonomio anstataŭos la merkatan ekonomion, celante justan kaj ĝustan dispartigon de la plenumendaj taskoj kaj de la enspezoj. Ĝi celas ankaŭ la bonajn rilatojn inter ĉiuj landoj laŭ tutmonda leĝo de reciprokaj avantaĝaj interŝanĝoj kaj respekto al paca kunekzistado.

O.P.

BIBLIOGRAFIO (ĉefaj verkoj)

En franca lingvo:

- Les doctrines économiques** (J. Lajugie) (La ekonomikaj doktrinoj, J. Lajugi), Kolekto "Que sais-je?"
Les yeux ouverts (J. Duboin) (La malfermitaj okuloj, J. Dübüen), nova eldono de M.L. Duboin.
Marx et l'économie classique (Les cahiers du contre-enseignement prolétarien n° 15-1934) (Marks kaj la klasika ekonomio) (Kajeroj de proleta instruado : malsimila instruado laŭ proleta vidpunkto)

En esperanto:

- Abundo kaj konsumsocio** (J. Dutoin, P.V. Berthier) Broŝurservo de SAT, 1975, Francio.
Maŝinoj, Mono kaj Mondpaco (Socikredita kunordiga centro, Britio).
Liberigo de Timo kaj Mizero (Internacia Asocio Bellamy, Nederlando). Elĉerpita.
(La du unuaj broŝuroj estas haveblaj ĉe la responsulo de la SAT-Frakcio por Disdona Ekonomio : E. Monier, F 05700 SAVOURNON)

A. Lopez Luna :

NI FILOZOFU BONHUMORE...

Fiere mi esprimas, ke el ĉiuj nun vivantaj filozofoj - se oni konsideras min filozofo, kompreneble - mi estas la unika, la sola, kiu bonhumore faras filozofion: kaj tio pritraktota klare pruvos tion al vi.

La Plena Vortaro, dua eldono, difinas la vorton filozofio jene: "Scienco pri la esencaj plej ĝeneralaj principoj kaj kaŭzo de la estado".

Sed kio, vere, estas filozofio? Ĝi estas iri al la kerno de la aferoj, peni eltrovi tion, kio kaŝiĝas en la aĵoj, tion kion scienco ne povas ekspliki.

Kial Naturo, ekzemple, kreis viron kaj virinon kaj provizis viron je elstarajo por ŝtopi truon en la virina korpo?

Sciencistoj diras, ke tio estas por ke ni reproduktiĝu. Sed filozofoj iras pli profunden, esploras la kialon.

Filozofoj, almenaŭ kelkaj el ili, reliefigas ĉi tion: ke la vira genera organo estas ligita al du testikoj. Se al la viro oni fortranĉas la "virilon", li plu estas viro, kvankam li ne povas plenumi determinitan funkcion. Tamen, se oni sentestikigas lin, li perdas sian virecon.

Tio ĉi estas filozofio: eltrovi la veron. Ĉiuj laŭdas kaj parolas pri la vira genera organo, sed malmultege memoras la testikojn, kiuj estas multe pli gravaj.

Mi ripetas: ĉi tio estas filozofio, samideanoj!

Povas okazi, ke prudaj legantoj konsideros min maldeculo pro tio supre pritraktita. Tamen tiuj sinjoroj devas kompreni, ke mi panegiras nenian malvirton. Mi, modestulo, faras filozofion, nome: mi filozofas laŭ miaj kapabloj kaj konoj; kaj tiuj, kiuj emas al tio rajtas pritrakti kaj nomi aĵojn, ilojn kaj cetere tute libere.

Ni, amantoj de la filozofio, enamiĝintoj de la filozofio, nek laŭdas nek mallaŭdas iun aŭ ion: ni pristudas ilin kaj prezentas niajn konkludojn, kiel ĵus demonstrote. (Bv. noti, ke mi skribis "demonstrote" kaj ne "demon S trite", kio odoras je "monstro").

Konklude: en mia opinio estas pli gravaj la testikoj ol la peniso, kvankam virinoj kaj samseksemuloj povas kaj rajtas, kompreneble, opiniu kontraŭe.

Gelaŭtuloj povos opinii, ke ĉi tiu artikoleto estas perdo de tempo, kiam estas tiom da gravaj aferoj, kiuj premas la homon. Sed ĝi intencas pruvi, ke la plejmulto el la filozofoj nur amasigas vortojn al vortoj, ili turniĝas kaj returniĝas ĉirkaŭ nenio, "verŝas la nenion en la malplenan". Tamen ne ĉiuj.

Karlo Marks (1818-1883), ekzemple, pere de sia ĉefverko **La Kapitalo** ŝanĝis la homan vivon.

Sed spite ĉion, mi bonhumore filozofis, ĉu?

Afablajn salutojn al ĉiuj gelaŭtuloj!

SIMPLA KLARIGO PRI ANO-NOMOJ

Ni ellernu Esperanton!

Ĉu la du esprimoj *Nederlandanoj* kaj *loĝantoj de Nederlando* estas egalaj? Neniel: saĝnas, ke ili montras du tute malsamajn aferojn!

1. *Nederlandanoj* estas *anoj de Nederlando*, t.e. homoj, kiuj apartenas al Nederlando. Reciproke *Nederlando* apartenas al *Nederlandanoj*. Tiel same temas pri reciproka aparteneco, kiam oni parolas pri *Francoj* kaj *Franco*, aŭ pri *Uzbekoj* kaj *Uzbekistano*, aŭ pri *Nepalanoj* kaj *Nepalo*.

Alidire la nomoj de la nacioj el la respektivaj landoj estas *Nederlandanoj*, *Francoj*, *Uzbekoj*, *Nepalanoj*.

2. Kaj *Nederlandanoj*, kaj *Nepalanoj* ne malpli honore kaj same plene nomas la naciojn de *Nederlando* kaj *Nepalo*, kiel *Francoj* kaj *Uzbekoj* nomas ilin de *Franco* kaj *Uzbekistano*! Ĉiuj kvar *Nederlandanoj*, *Nepalanoj*, *Francoj*, *Uzbekoj* estas etnaj nomoj: la diferenco estas pure kontingenta kaj pure lingva: jen radikoj, jen derivaĵoj, sed signife ĉiuj kvar nomas etnojn.

Iuj reagos demandante, kiel do nomiĝas *Poloj*, *Belorusoj*, kiuj loĝas en *Nederlando*, *Franco*, *Uzbekistano*, *Nepalo*. Dume aliaj neniel trovos, ke estas problemoj en tio: ili ja tutsimple estas *Poloj* aŭ *Belorusoj loĝantaj en Nederlando*, *Franco*, *Uzbekistano*, *Nepalo*. Kaj certe ne eblas nomi ilin alimaniere, ol per tiuj precizaj esprimoj!

3. Iuj insistos kaj demandas, ĉu oni ne povas nomi ilin *Francoj*, *Uzbekistanoj* kaj simile! La respondo troviĝas en tiu esprimo: *kaj simile!* Efektive kiel do nomi ilin, kiu ne estas *Nederlandano*, kiu do ne apartenas al *Nederlando*, kiu do havas nek la *Nederlandan naciecon*, nek apartenas al la *Nederlanda etno*, kaj tamen loĝas en *Nederlando*?

Se iu plu insistos, nur demandu lin: "Kiel do vi nomas personon de *Nederlanda etno*, se vi insistas, ke *Nederlandano* nomas ĉiu persono, kiu loĝas en *Nederlando*?" La insistanto estos embarasita, ĉar ne eblas respondi! Sed se la sama volas persisti en sia eraro, li senzorgeme respondos: "Ah! mi ne scias tion; necesus demandi de *Nederlandanoj!*"

4. Alia afero estas, se iu ekloĝas en difinita lando kaj post jaroj klopodas akiri la civitanecon, la naciecon de la nova gastiganta lando. Tiel iu akiris, ekz-e, la *Francan civitanecon*, li do fariĝas *Franco*; laŭjure "*Franco per naciigo*"; sed *Franco* tamen.

Sed en ĉiu lando estas eble simitaj, sed certe mal-samaj leĝoj por tia akiro de nacieco. Se iu naskiĝis en *Pollando* kaj akiris la *Francan naciecon*, li rajte sin nomas *Franco*. Sed tiun kvaliton li ne povas havi per simpla loĝado aŭ restado en *Franco*. Simile, simpla loĝado aŭ restado en *Nederlando* neniel laros de *Franco* iu *novan Nederlandanon*. Por fariĝi *Nederlandano* necesos, ke li klopodu laŭ la *Nederlandaj leĝoj*.

Oni agnosku la komplikecon de la leĝoj kaj de la homa spirito, kiu ne kontentas kun simplaj aferoj, kiel ekz-e, ke "ni ĉiuj estas homoj!". Sed oni prenu ĝin, kia ĝi estas!

5. Kontraŭe evidentas, ke iuj Esperantistoj dezirante ĉion lingve "simpligi", fakte kaj male ĉion iĝas komplika, eĉ la simplajn aferojn.

6. Resume:

6.1. Ekzistas duobla kaj reciproka aparteneco: *Uzbekoj apartenas al*

Uzbekistano / Uzbekistano apartenas al Uzbekoj. Tiel estas por ĉiuj landoj kaj por ĉiuj landanoj.

6.2. Tiu regulo rilatas al la naturo de la aferoj: ĝin ne modifas la lingva fakto, ke en Esperanto la landnomoj apartenas al du kategorioj.

Nome, al la **Unua Kategorio**, en kiu la landnomo estas radika vorto, dum la **ano-nomo** estas derivaĵo (Nederland-o / Nederland-anoj; Nepal-o / Nepal-anoj; Brazil-o / Brazil-anoj . . .) kaj al la **Dua Kategorio**, en kiu la **ano-nomo** estas radika vorto, dum la landnomo estas derivaĵo (Belorus-oj / Belorus-io, Skot-oj / Skot-lando, Afgan-oj / Afgan-istano, Kurd-oj / Kurd-istano . . .).

6.3. Oni evitu erarajn kaj erarigajn esprimojn: *Nederlandanoj* signifas **anoj** de *Nederlando*, sed neniel "*loĝantoj*": ili ja povas loĝi kie ajn aliloke, en *Brazilo*, *Uzbekistano* aŭ *Francoj*; ili ĉiam restas *Nederlandanoj*.

6.4. Se iu volas rifuzi tiujn kelkajn regulojn de sana prudento, li nepre kondukos diskriminacie kontraŭ iuj popoloj, kiel ekzemple la *Nederlandanoj*. Ni sekve estas kondukita al tiu plia regulo, ke la du nomoj *Francoj* kaj *Francianoj* havas ekzakte la saman signifon.

La dua estas senutile komplika. Aŭ se oni volas ĝin uzi, ĝi estas sinonimo de la unua.

6.5. Ekzistas iuj Esperantistoj, kiuj volas uzi nur esprimojn kiel la pli komplikajn, por ĝeneraligi al derivaĵoj per *-anoj* ĉiujn **ano-nomojn**. Tio estus legitima, sed nuntempe tio ne estas en uzado.

Sed ankaŭ la uzado de *Francoj* kaj de *Francianoj* en du malsamaj sencoj samĉe ne estas en uzado: ĝi estas nur amuzilo de pseŭdogramatiko, kiun iuj Esperantistoj uzas en sia kurso.

6.6. Korolarie, oni nun komprenas, ke se iu volas, ekz-e, perforti la signifon de lando *Nepalo*, al la eraraj "*Nepal-oj / Nepal-io*" sub preteksto, ke la *Nepalanoj* havas nacian historion, nacian lingvon kaj konsistigas nacian etnon, tio estas pure vana!

Ĉar eĉ tiam oni devus rimarkigi al li, ke la falsa "*Nepal-oj*" ne havas alian signifon ol la ankaŭ falsa "*Nepalanoj*". Krome per tiuj falsajĵoj oni atencus al la nomoj monde konataj en ĉiuj lingvoj kaj uzataj ĉie aliloke en Esperantio.

Des pli ke la ĝustaj nomoj neniel apartenas al la koncernitoj, kiuj ne povas pretendi al tia eksterordinara monopoto super ili. Sed ili apartenas al Esperanto, kiel ĉiuj aliaj vortoj kaj nomoj, t.e. al ĉiuj Esperantistoj sur nia eta blua planedo!

Des pli peza respondecado antaŭ la historio de nia lingvo surprenas tiuj, kiuj persiste volas resti en la eraro, eĉ post kiam oni demonstris ilian eraron, sub la nura preteksto, ke oni tiel eraras de 70 jaroj en ilia "suverena" peceto de tero. Ĉu la ne-erarantoj devus cedi antaŭ la erarantoj?

André ALBAULT

EPITAFIO

Sen eĉ eta timzorgo mi vivis,
Laŭ la simpla vivleĝo mi drivis
Blindobee al bona Natur'!
Kaj ĉi tie miregas mi nur,
Ke Mort' iam ja pensis pri mi
Dum neniam mi pensis pri ĝi.

Mathurin Régnier (1573-1613)

Elfrancisgis André Gilles



VORTOJ DE MALJUNULO

valo

SURVOJE AL FINO

"Vetera malvarmiĝo kaj ŝaŭmo sur la maro,
Ĉio diras ke vintro alvenis por mi,
Kaj ke urĝas rikolti nun miajn olivojn,
Kaj oferi oleon sur l'altaro de Dio."

Per tiu verskvaro Frederiko MISTRAL prezentis sian lastan poemkolekton "*La Olivrikolto*" (lasta de la jaro en Provenco).

Mi volonte adoptus ĝin por mi mem se mi havus ion por rikolti kaj ion por oferi.

Sed Mistral estis genia poeto, kaj Valo ne estas Mistralo.

Kiel vi fartas?

Tro bone!

Ja tro bone, ĉar mi sentas min sufiĉe fortika por vivi eble kelkajn jarojn plu - se tio estas vivi. Sed mi ne tedos vin per detala priskribo de miaj nunaj malagrabloj. Kiom ili pezas en komparo kun la universalaj plagoj: militoj, naturaj kataklismoj, katastrofaj akcidentoj, nekuracataj malsanoj, amasmortiga malsato?... Krima homaro, kiu permesas ĉion ĉi! Ja ĉion, inkluzive la kataklismojn, ĉar ili estas nun antaŭvideblaj, do almenaŭ parte eviteblaj en siaj konsekvencoj. Sed la regnestroj kaj registoj, aprobatas de la plimulto de l'civitanoj preferas dediĉi inteligenton, tempon kaj monon al inventado kaj fabrikado de pli kaj pli perfektigataj amasbuĉiloj.

La 9an de februaro mi eniris en mian 92an jaron. Estas tro! Nun mi serene atendas la finon. Venu la morto iam ajn, mi estas preta, kaj esperas ĝin akcepti kun rideto, kiel amikon - kvankam ĝi kruele forprenis amikojn kaj amatojn.

En tiu trankvila atendo, mi ankoraŭ ĝuas kelkajn vivplezurojn.

En ĉies ekzistado estas horoj malagrablaj kaj tagoj de doloro. Mi provu ilin suferi se eble en silento, almenaŭ sen troaj plendoj kaj lamentoj. Kaj ni konservu en fidela memoro la bonajn kaj belajn momentojn. Eĉ se malmultaj, ili konsistigas neelĉerpeblan fonton de ĝojo.

Karaj gejunuloj, kuraĝe antaŭen! Plene vivu vian vivon, kaj kolektu tiun trezoron el belaj rememoroj, kiu iom lumigos la grizon de malgaja periodo. Kaj diru kun via maljuna amiko, kaj kun nia saĝa majstro Epikuro: Malgraŭ ĉio, entute la vivo estas bela.

Amiko leganto, se vi estis sufiĉe pacienca por legi ĝis tiu ĉi linio, ĉu en la antaŭaj vi rimarkis kelkajn kontraŭdirojn? Ja sendube, sed pripensu: ĉu la vivo mem ne estas knedata el kontraŭdiroj?

Komencinte per cito de nia kara provenca poeto, mi citos nun nian amatan franclingvan poeton el Flandrio, Emilo Verhaeren :

"Sin mergi ĝis perdiĝo en la vivon memkontraŭdiran sed ebriigan."

Kaj mi finos per cito de alia poeto kaj saĝulo, la granda Omar Kajjam :

"Se iam vi estos senkuraĝigita, tute senespera; se vi dezirus, ke definitiva nokto ekfalegu sur la mondon, pensu pri vekigo de fano."

PRINTEMPO EN PROVENCO

Dudekunuan de marto. La suno brilas. Mi sentas la varmon de ĝiaj radioj. Mi scias, ke la ĉielo bluas, sed mi ne vidas ĝin. En la ĝardeno de mia filo sur la verda razeno floras violoj, kies dolĉan odoron mi fla-

ras. En la branĉaroj de altaj pinoj, ileks-kverkoj kaj cedroj, svarmas birdetoj kies pepadon mi aŭdas. Tie estas ankaŭ unu sciuro, kiun mi ne vidas.

Venis vizito de nia filino kun ŝia filo kaj ŝia bofilino kaj ilia filo, nia pranepo Francisko. Li krokizis per kraĵono sur papero la sciuron, kaj oni diras al mi, ke la bildo estas bone skizita. Ĉu do li heredas la dispozicion de sia praavo, kaj precipe de ties patro? Li rakontas pri sia unua skiado sur pirenea neĝokampo, pri sia unua trajnoveturado de Tuluzo al Avinjono. Tio rememorigas min pri miaj fervojoĵaĝoj inter Aleso kaj Arlezo kun mia avo, la emerita lokomotivisto. Mi aŭskultas kun ravo la klaran voĉon de la bubeto, mi kisas liajn freŝajn vangojn, mi saltigas lin rajde sur miaj genuoj:

"Kiam rajdas sinjorino, malrapidpaŝe, malrapidpaŝe...

Kiam rajtas sinjoro, trote, trote, trote!...

Kiam rajdas Francisko, galope, galope, galope!"

Liaj ridotriloj plenigas la ĉambron. Mi estas feliĉa. La vivo estas bela.

Ĉar Francisko estas nun en sia kvina jaro, tre probable li daŭre memoros pri siaj gepraavoj, kiel mi memoras pri mia praavino kaj ŝia patrino, kiujn mi vizitis en 1904 en Taraskono. Bildo ne tre preciza, sed forte stampita. Kaj mi ankoraŭ aŭdas iliajn voĉojn en la melodia provenca lingvo.

Tiu bela printempa tago rapide pasis, venis la tempo de disiĝo. Sed ili revenos post du monatoj, en majo.

Majo, kulmino de la printempo! Mi estas feliĉa.

(Noto de la red. : La ĉi-suprajn artikolojn Valo registris kasede.)

NI PRENU NIAN BIENON, KIE NI ĜIN TROVAS

En antaŭa artikolo mi pledis por uzado de la pronomo "ci", ne en ĉiu okazo, kiel en latino kaj kiel volus la logiko, sed almenaŭ inter konsentantaj amikoj kaj kamaradoj, imite al multaj modernaj nacilingvoj.

Same mi opinias, ke konvenas adopti vortojn el diversaj naciaj lingvoj respondantaj al specialaĵoj de la rilataj etnoj. Jam troviĝas ekzemploj en PIV : la fundamenta "barĉo"

el la rusa ; el la pola, starosto, vojevodo ; el la germana gemuta kaj el la portugala saŭdado, ambaŭ proponitaj de Grosjean-Maupin ; el la japana, hajko, gejšo, getao, kimono, obio, samurajo, tatamo ; el la hinda, jogo, samgo, aŝramo, darmo, sario ; el aliaj ĵinrikŝo aŭ rikŝo, pareo, poŝo... Ĉiuj tiaj vortoj esprimantaj ion konkretan aŭ abstraktan propran al unu etno, devas ricevi civitorajton en nia internacilingva vorttrezoro. Restas ankoraŭ vastaj esploraĵoj teritorioj, tra kiuj ni povas pluki novajn elementojn por nia komuna vortaro. Ĉu ĝi tial troŝvelos? Ne timu: ĝi nur tiel riĉiĝos per interetna, kosmopolita, fine sennacieca kaj tuthomara kulturo.

Ne temas pri senutilaj neologismoj aŭ "esperantalo", kiel diras Ergoto, sed pri bonvenigindaj "fremdaj vortoj", dank' al kiuj la lingvo internacia fariĝos vere tutmonda.

VORTSIGNIFA EVOLUO

El "Etiko I", p.116, piednoto** :
 "Lastatempe oni ofte miksas, precipe en Germanio kaj Rusio, la konceptojn "kulturo" kaj "civilizo", t.e. klerigo. Tamen, en la 1860-aj jaroj ili estis severe distingitaj. Kulturo oni nomis tiam la disvolvigon de la eksteraj vivkondiciaĵoj, de higieno, de komunikiloj, de eleganteco de la loĝejo, k.s. Dum civilizo, aŭ klerigado, signifis la evoluon de kono, de pensado, la kreivan agadon kaj la aspiron al pli bona vivaranĝo".

Nu, ni povas nun konstati en la tuta mondo, aŭ almenaŭ en la okcidentaj landoj, ke la signifoj de tiuj vortoj ne nur miksiĝis, sed eĉ inversiĝis : civilizo rilatas precipe al materiaj efektivecoj kaj evoluo de la vivkondiĉoj, kulturo al intelekto kaj artoj : vidu, por ekzemplo, en Francio, la ministerion pri kulturo.

Ankoraŭ en 1914 la du konceptoj estis miksitaj, kiam la aliancanoj sin pretendis defendantoj de la Civilizo, kaj la germanoj de la "Kultur". Nun, la sama inversiĝo estas plenumita : pri tiu inversiĝo atestas la difino de "kulturo" en PV kaj en PIV. Stranga evoluo en la vivo de vortoj.

VALO

ATEISMO LAŬ ANGLA MANIERO

Mi konfesas, ke legante pri ateismo en Laŭte mi plej ofte tuj turnas la paĝon. "Malkatolika, malliturgia", Jake-lino diris en Laŭte 87, kaj tio sufiĉis. Sed eble oni povas prezenti pli vastan menuon, ekzistas ateismoj por diversaj gustoj (kiuj neas malsamajn diojn!). Jen poeto laŭ mi simpatia (ĝis mi foliumis biografion - kaj trovis lin veanta ke angloj ne buĉis pli da en Irlando en 1916) kiu estis certe ateisto... laŭ angla maniero. (Mi citos kelkajn poemojn, sed tajpos ilin proze, parte por ŝpari arbojn, parte por ne fortimigi legantojn, kiuj ne digestas versblagon.)

Thomas Hardy (Tomas Hardi por Ergoto), 1840-1928, verkis dekon da romanoj ankoraŭ legataj, milon da poemoj - kaj estis ankaŭ arĥitekto, li restaŭris preĝejojn. Jam en frua poemo (1866) li neas Dion; se mi scius, ke miaj suferoj ravas iun vengeman dion, mi eltenus, kontenta ke potenco lu volis tion; sed eĉ tian konsolon mi esperus vane... Kaj jen "Kristnasko: 1924": "Ni kantas "Pacon sur la Ter" / kaj pagas pastrojn por l'afer' / da mesoj / du jarmiloj pasis / dum ni sukcesis - venengasi." (Kursivo montras citon, alie mi resumas.)

Kaj "Pluventus paskmatene": "Li releviĝis, ĉu? Nu, estu... / Pensemaj landoj plue plendas, / mortintoj ankaŭ nun atendas, / dubante: Ĉu ni tamen restu? / Ĉar kiu scias, ĉu la sort' / tra l'pordo plaĉos pli ol mort'? // Kun ili staras mi. En pluv', / Taksuso kaj ventkoko tremas / kaj ĉaro kiu ŝarĝo premas / trenadas sin ĝiskreve plu. / Veantaj laboristoj emas / ripozi - malgraŭ la relev'." (Hardi verkis multajn poemojn en du strofoj kiuj spegulas unu l'alian, kiel tie ĉi; sed mia tajpmaniero kaŝas tion. Kiel juna homo li violonis por dancoj, kaj li ĉiam donis al la plej komplikaj pensoj formon de kanzono - laŭ iuj de himno.)

"Kaj nun al Di' la Patro - jen li finas / kaj lia voĉ' altrilas la tegolojn; / singultoj dum li sin fervore klinas... Ridetas memkontente nun l'idolo / kaj reaktoras en vestej-spegul' / predikajn gestojn kiuj tuŝis korojn..." Sufiĉe, ĉu, por montri lin ateisto? Sed en tio aŭ "La Bovoj", kiuj laŭ fabelo surgenuas kristnas-

kan vesperon, oni sentas mildan ironion, sed nenion akran.

Nun mi volas pluiri al malpli rebataj trajtoj. Efektive li restaŭris vilaĝajn preĝejojn, en epoko kiam "katedralojn anstataŭis fervojstaciojn". Gotikajn preĝejojn. Kaj tie li konsciis dilemon. Teorie, t.e. laŭ nunaj teorioj, oni povas rekrei la formon per aliaj materialoj. Sed fakte, se preĝejo gravas ĉefe kiel bastiono de **memoro**, esencan rolon ludas la frotitaj ŝtonoj, la malrektaj traboj, eĉ mallertaj trajtoj kiuj apartenas al la loko dum jarcentoj...

Ĉefsidejo de memoro estas kompreneble la **tombejo**. Jen "Sendorme" : *"Vi nun oriente rigardas nin, stel' matenhela, / mi scias, vi kvazaŭ aperus. / Survolbe gravuru, fag', branĉojn, eĉ plej bagatelan, / mi skize krajonsurpaperus. / Vi, kampo, blankiĝas nun, rosvalita kovrile, / mi vidas vin kvazaŭ surloke. / Tombejo, vi lumas el ombro taksusa malbrile / dum nomoj elrampas elroke."*

Tiel Hardi. Kaj jen poeto, kiu loĝis apude, pastro, poligloto, aŭtoro de "Filologia Gramatiko, bazita sur l'Angla Lingvo, formita per komparoj de pli ol sesdek lingvoj" (1854) kaj "Pri la Radikoj de l'Angla kiel Teŭtona Lingvo" (1862), kiu celis bremsi la fordrivon de l'nacia lingvo for de tiu kiun antaŭ la normanda invado parolis Reĝo Alfredo, kiun lokaj kamparanoj (ni estas en la regiono kaj epoko de la sindikataj pioniroj, la "Tolpuddlemartiroj") ankoraŭ parolis - sed komencis honti sub influo de edukado... Hardi verkis nekutiman patriotan poemon en aprilo 1915 (fakte ĉio verkita de Hardi surprizas...): *"Ĉarpadojn mi promenis, longe for / de strato kaj fervojo... - kaj aŭdis parolturnojn, kiuj povas esti transkribitaj per germanaj vortoj pli efike ol per anglaj, kaj bedaŭris tiujn kiuj "ĵetis flamon inter homojn lingve tiel parencajn".*

William Barnes (1801-1886) l'alia poeto nomiĝis. Li estis instruisto kaj nur poste pastro. Jen lia okverso, verkita en loka **dialekto** (tiuj "vortoj kiuj rompas la dentojn de l'elito, laŭ Hardi, kiu redaktis la poemojn de Barnes kiel unu el malmultaj kiuj tiun lingvon scipovas):

"Somera voj' al preĝoj kurbis / laŭ klif'; heder' en heĝoj verdis. / Somera voj' arbare urben; / folia bril' en l'arboj verdis. / Somera voj', en kampo mel-

ki, / tra bordkareksoj; ambaŭ verdis. / La vojoj hejmen kune plektis; / muskrandaĵ tegmentŝtonoj verdis."

Mi trovis la librojn de Barnes, neniam reeldonitaj, en la katalogo de la biblioteko en Dorchester, la regiona ĉefurbo kie Hardi loĝis, dum pluva posttagmezo, rezigninte promenon. Ĉar mi vizitis iam tiun regionon, travagis centojn da kilometroj perpiede. Mi memoras kalkdeklivojn, blujajn papiliojn...

Hardi, kiu loĝis tie, verkis ankaŭ pri la pluvo kaj koto, pri ŝafoj kun trempitaj feloj ĉe foiroj, *"Bariltabuloj dense gutas; / reaperantaj el nebul' / arĝentbutonoj ..."* *"Printempa vent' amare blouvabutas, / malpurajn nubojn surĉiele ŝutas. / Kolomboj, frugilegoj pluvtaŭzitaĵ; / Naturo, vi hodiaŭ senmeritas!" / Paŝtisto blankkitela ankoraŭ staras / nenion rimarkante krom la ŝafaro.*" ("Malafabla Majo")

Hardi havas vortojn por mi, "La Vaganto", kiu ne aŭdas ka-primulgon bleki, sed nur memoras ion jam preterpasitan... (Grava bildo por kompreni tian poezion estas eble "kvintabula krado", kiu fermas kampon - kvin tabuloj horizontaj kun oblikva, diagonala - sur kies supra tabulo viro apogas sin, medite suĉante herberon...)

La regiono havas famajn klifojn kaj golfetojn (kovras multajn golfo kaj l'armeo nun), duoninsulon tiel krutan ke ĝi havas ĉiam kvazaŭ nubĉapelon; akvo kondensiĝas dum ĝi grimpas klifon kaj revaporiĝas aliflanke; la formo restas, sed kun evidenta daŭra ŝanĝo de konsisto... Kaj restas la triobla reparaĵo de ferepoka urbo, labirinta, sia-speca Trojo - kie la serĝento fleksas sian sabron antaŭ virino en romano "Longe for de l'frenezulamaso". Hardi ŝatis Vergilion en dekokjarcenta traduko...

Jen kiel mi resumis iam lian epitafon "Poste" : *"Dum verda majo flugilbatas, / folioj silke delikatas; / dum ŝvele ŝvebas mortsonor' / ĝis falĉos ĝin ekvento for; / dum papilia nokto talpas, / trans herbon erinaco palpas; / - ĉu daŭros mia ripetem'? / Ĉu oni diros: "Lia tem' " ?*

Ankaŭ nuboj estas parto de l'pejzaĝo : *"Klifsupraj rokaj postsunsubiraj nuboj... / Sed se la glorabismo vin prezentas / inter la cindra nubo kaj grizbrun' / ŝanĝitas via ĝismorta formo nun, / transtera firmament-*

rajdanta esenco..." ("Li preferas ŝin tera")

Hardi havis sian opinion, kio venas antaŭ kaj post la vivo : "Kantadas turdoj dum sunsubiro / kaj fringoj fajfas en paroĵ / kaj dum noktigo najtingaloj / malsurdaj / la tutan tempon, dum aprilo / paradas ilin, fortrilas. // Jen novaj dekduonataj birdoj, / kiuj antaŭ unu-du jaroj / nek fringoj estis nek najtingaloj / nek turdoj / sed nur eretoj de la ter' / kaj greno, pluv', aer'." ("Fieraj kantbirdoj")

"Pec' el ĉi taksus' / l'avo konis lin / tiu branĉ' - l'edzin'... Ili do ne sub ter' / loĝas, sed nerve, vejne / kreskas en l'aer', / sentas pluvon veni, / sunon, forton ree / kiu ilin kreis!" ("Transformoj")

"L'anim' ne loĝos en tumulto, / surbrusta kaĝ' / sed vagos en memorvojaĝ' / ĝis sur la pint' (laŭ mi, tremulo) / de l'vivpejzaĝ'. // Fantompieda form' survoje, / noktgriza hor' ; / la tien reen de l'esplor' / mi konis kun alia foje / en tagoj for."

Notu la direkton en "Fieraj kantbirdoj"; ne temas pri disigo, sed pri **formigo**. Kaj **formoj** povas vivi post la materia disigo. Eble vi ne trovas tion ateisma? Mi ne vidas, kial ne.

Nei dion ne signifas nei spiritan mondon, laŭ mi. Eble formoj povas daŭri kun ŝanĝita materio? Aŭ ĉu l'animo loĝas sur iritaj vojoj simple per memoro, dum virino lin memoras? Kion Hardi kredis estas temo por pli longa verko, jen ŝajne temas nur pri memoro, jen ŝajne pri io pli...

"La Figuro en la Sceno" temas, kiel li komencis per krajono skizi virinon sur roka deklivo - ĝis pluvo forviŝis la strekojn, lasis "filigran-makulojn". Sed "ŝia pluva formo ankoraŭ animas la lokon." Ĉu nur por li, dum li kapablas memori - aŭ ĉu vaganto sentus la ĉeeston? (Eble tamen vaganto ne sufiĉe atentus...)

"Kion grimpante ni diris, faris, / malmulte gravas, nek ties sekv' / Kion ne cedos la viv' avara / sen trudo ĝis l'esper' estos sek', / sentoj eks. // Momenton daŭris. Sed ĉu temp' iam / elstaris ĝis aŭ post', tiel brile / en hiltorio? Laŭ iu neniam / dum lerte aŭ pene grimpis la hilon / pluaj miloj. // Prarokoj formas laŭvojan bordon / kaj multon paseman frontis la rand', / komencon kaj finon de l'Tera ordo / sed kion registras koloro kaj fand' / tretis nia pland'."

Jen la mezo de poemo en granda ciklo "Poemoj de 1912-13" pri eksamatino. Aliaj poemoj en la ciklo prezentas pli modestajn pretendojn - sed eble Hardi pravis

insisti, ke intensaj momentoj lasas spuron brulstampitan en la rokoj aŭ en io pli daŭra...

"Momentoj de vizio" Hardi nomis malfruan poemaron. Kiel vivi kun tia konscio, ke momento povas makuli la mondon? Mi resumas la supre diritan jene:

1. Prizorgi ĉion, kio daŭras, kio portas homajn spurojn.
2. Atenti eĉ plej efemerajn bagatelojn.
3. Subteni fortan lokan patriotismon.
4. Toleri ekleziajn tradiciojn.
5. Melankolii pri mondperspektivoj.

"Mi venas al la fino de vizioj / ke eblas la mal- ebla en ĉi mond', / ke bonaj tempoj venos post mal- bon', / la raso sin kuracos per racio..."
Komparu "Aŭgustan noktomezon": "Ŝirmita lampo, kur- ten' ondanta, / horloĝbataĉ' el etaĝo fora; / eniras - kornaj, flugilaj, dornaj, - tipolo, papilio kaj bur- do, / dum meze de l'paĝo, ne laborante, / dormema muŝo frotas la manojn. // Do jen kvinop' en loko paca, / en tempo nun, tie ĉi en spaco. / La gastoj ŝmiras la novan verson / aŭ trafas la lampon kaj falas ren- verse. / "Humilo de Dio", mi pensas. Sed kial? / Pri l' tero mi scias malpli ol ili."

Por rimi tiujn temojn mi finos per sinsekvaj versoj de poemo kiun Hardi verkis fine de l'deknaŭa jarcento, "Te- nebre" : "Se ekzistas plibon', iri tien / eblas nur plej malbonon gapante. / Rav' - mi trovas ĝin plant' delikata, trompo premas ĝin, timo, kutim'..."

Meva Maron



Tute nude ŝi pisas. Sen ia ĝeno, sen miro, ŝi rigardas kaj ridetas al mi. Kiel 20-jaraĝa Koreino, tiom hontema en lando, kie la tabuoj kaj la striktaj moroj estas ankoraŭ tre fortaj, povas tiel konduiti? Mi estas perpleksa.

Popolaj karakteroj ĉiam mirigas min, aparte la korea. Kvankam Koreio estas konfucianisma lando, la karaktero de la loĝantoj estas tre mediteraneeca. Vojaĝantoj, kiu restis sufiĉe longe en la lando de la kvieta mateno, ne kontraŭdiros min: Pasiĝaj, entuziasmaj, ribelemaj, koleremaj, bruemaj, bonkoraj, amikemaj; jen kelkaj adjektivoj, kiu tute adaptiĝas al la Koreoj. Tamen, junaj Koreoj (kiam ili ne estas manifestaciantaj studentoj!) estas ege hontemaj, ĉefe la junulinoj. Antaŭ tri tagoj mi gastis ĉe familio korea, kiu multe vojaĝis kaj eĉ vivis eksterlande. Laŭ ilia mempritakso, korea karaktero plej similas al la itala.

Myong-son kuŝas sur la lito, sub la plumlitaĵo, tute vestite. Ŝi tradukas longan parton de la verko de Alphonse Daudet "**Le Petit Chose**" de la franca al la korea. Kiom da idiomoj de la 19-a jarcento malfacile tradukeblaj por ŝi! Mi mem ne komprenas kelkajn el ili. Ŝi povas skribi, legi, konsulti siajn dikajn vortarojn tiel kuŝante dum horoj. Plaĉas al mi, ke ŝi kuŝas sen demeti la vestojn. Ŝi havas kutimojn de malriĉuloj kaj tute ignoras kiel faras pli bone "edukitaj" homoj. Mi tamen postulas, ke ŝi forigu almenaŭ la pantalonon.

"Kimpap!" Ĉiuhore aŭdiĝas la voĉo de la kimpap-* vendistino tra la hotelaj koridoroj. Mi ŝatas la melodion de ŝia voĉo kiiimpaaap! Myong-son malsatas. Ŝi plutradukas kaj mi provas helpi ŝin. Noktomezas. Mi rapide vestiĝas, eliras el la ĉambro kaj atendas la vendistinon, kiu proksimiĝas plukrivarbante sian vendaĵon. Dika kaj maljuna, ŝi portas surkape grandan kaldronon kovritan per tukoj.

Viro sekvis ŝin por la dua fojo. Li konas ŝian adreson. La patro ne rehejmeniras. Ŝi kaj ŝia 16-jara fratino timas (malgraŭ la ŝlosita pordo!). Ŝi postulas mian tujan venon (estas jam la 11-a vespere). Mi hezitas... Mi adiaŭas mian bone konatan gastigant-inon kaj parsonpetas pro mia subita foriro. Kolego ŝia akompanas min taksie al la Myong-sona loĝejo. Kvankam mi jam preparis monon por pagi la vojaĝkostojn, mia akompananto pagas ĉion (li estas Koreo) kaj helpas min trovi la ĝustan loĝejon. Adiaŭo. Myong-son malfermas la pordon. "Mia patro ĵus revenis." "Bone, mi tuj foriros." "Ne, vi tranoktos ĉi tie..." Diskutado. La patro aperas. Pli granda ol mi, iom abrupta kaj senpacienca, li ordonas ke mi eniru. Mi mole rezistas kaj fine submetiĝas. Tute stulte, ke mi jesis al la Myong-sona peto, mi tute ne emas konatiĝi kun la patro je tiuj horoj kaj cirkonstancoj. La loĝejo malgrandas; kuirejo, banĉambro kaj du dormĉambroj. Tio estas normala en Seulo. Mi sole dormos en ĉambro, Ja-suk kun la du gefratoj en la alia kaj la patro en la kuirejo. Dum mi babilas kun la patro kun Myong-son kiel interpretistino, la 16-jara fratino legas la Biblion. Kiel en Japanio, mezlernejanoj kaj ĉefe altlernejanoj** studadas tuttage kaj tutsemajne por eniri universitaton, faman se eble. Estas mirinde por mi, ke ŝi, post longa studtago, emas legi la Biblion noktomeze.

La fratino fervore protestantas, la patro buddismas (verŝajne ne tro fervore), la juna frato momente kredas je basbalo*** kaj Myong-son ĵus malkatolikiĝis post 6-monata religia instruado kaj ĉiudimanĉa vizito ĉe la katedralo. En Koreio, oni ofte kristaniĝas dum la adoleskeco pro la influo de samaĝa amiko en altlernejo aŭ en la universitato. Ne maloftas tiu fenomeno de aparteno al pluraj religioj en la sama familio.

Noktas. Ni promene surstratas. Homoj suarmas. Vendistoj surstrate sidantaj, ridantaj kaj laŭtparolantaj promenantoj. Kiel ĉie en Koreio, ĉefe en tiu ne turisma monato, okcidentaj vizaĝoj tute ne videblas. Oni apenaŭ rigardas al mi, parte pro la nokto, pro

miaj nigraj haroj kaj ne granda alto, parte ĉar Koreoj ĝenerale ne insiste rigardas al eksterlandanoj. Tamen, mi scias kion ili pensas. Mi estas "usonano" kaj Myongson "putino". Usono fariĝis la plej malŝatata lando, eĉ pli ol Japanio.

(Daŭrigota)

R.A.C.

* rizaĵo envolvita en marherbo. ** liceanoj.

*** usondevena sporto.

JEDANSMER...

Okaze de nia neforgesebla vojaĝo en Jugoslavio, mi devas rakonti al vi ion ridigan...

Tre bone pasis la vojaĝo ĝis Beogrado (nur en itala tendumejo iu rabis malgrandan vestaĵon de nia filino : ne gravis!). Ni eniris en Beogradon kaj serĉis tendumejon, sed ni devis provizumi la familion! Do, ni revenis en la centron de la urbo, aĉetis lakton, supon, fruktojn, ktp... kaj ni esperis rapide retrovi la tendumejon, sed per kiu vojo?

Andreo diris al mi: "Ne gravas! Mi vidis panelon kun sendube la nomo de malgranda vilaĝo "Jedansmer". Ni serĉu kaj ni retrovos la vojon!" Sed tre ofte ni vidis "Jedansmer". Kiel granda vilaĝo! Jedansmer... Jedansmer... sed neniam nia tendumejo! La infanoj ploris : "Ni ne plu retrovos nian tendumejon!" Ili ĉefe malsatis! Andreo decidis retrovi la enirejon de Beogrado kaj la direkton de nia tendumejo. Fine, je la naŭa, ni retrovis ĝin. La infanoj retrovis ĝojon... kun la lakto!

Morgaŭe, okaze de la esperantista kongreso, ni devis renkonti niajn korespondantojn. Tre facile ni rekonis Blaŝkon (kiu, en letero, portretis sin : granda kun tre nigraj lipharoj!). Kune ni vojaĝis ĝis Subotica. Dum la vojaĝo ni provis rakonti - nature en esperanto - nian aventuron. Blaŝko eksplodis, ridis, ridis... kaj, fine, klarigis al ni :

Jedansmer estas : unudirekta vojo!

Nicole S.

Nia felietono :

FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO de Petro USPENSKO (OUSPENSKY)

(resumpecoj)

8

NI ŜPARU ENERGION

(el la 9^a ĉapitro)

Ĉiu funkcio, ĉiu stato,
Ĉiu ago, penso, sento
postulas energion,
substancon difinitan.

Por la labor' utila,
laŭ ĉi psikologio,
ni nepre devas lerni
pri l'ŝpar' de l'energio!

Ĉar l'energio mis-uziĝas
pro negativaj emocioj,
pro angorplenaj atendadoj
de la malagrabraĵo
probabla, neprobabla,
kaj pro mil incitiĝoj,
pro senutilaj urĝoj,
malbonhumoro, nervoziĝo,
pro frivola revado
kaj vana imagado.

Misfunkciado de la centroj;
muskolsteĉiĝo senutila;
babilado sencela;
atento dediĉita
al ĉiu negravaĵo
okazanta ĉirkaŭe,
aŭ al personoj
nemeritantaj eĉ rigardon,
kun kiuj ni faros nenion.

Per la batalo ĉiutaga
kontraŭ negativaĵoj,
ni ŝparas l'energion
por la pozitivaĵoj:
Labor' psikologia
por propra perfektigi
de nia vera MIO!

(Versumis: EdeB)

La homa organismo kompareblas al fabriko de ĉiamiaj produktoj, kie ĉio estas antaŭvidita por tre alta rendimento. La fabrik-laboro konsistas en transformado de unu klaso de materio en alian, nome, el la kosma vidpunkto, la plej krudajn substancojn en pli fajnajn sub-stancojn.

La fabriko ricevas el la ekstera mondo, kiel krud-materialon, kvanton de krudaj, nepoluritaj "hidrogenoj"; kaj ĝia laboro estas transformi ilin en pli fajnajn, en pli subtilajn "hidrogenojn", per tuta serio de komplik-itaj procezoj ALĤEMIAJ.

Sed en la ordinaraj kondiĉoj de l'vivo, la "Homa Fabriko" produktas nesufiĉan kvanton da pli fajnaj "hidrogenoj", kiujn ni bezonas por atingi superajn statojn de konscio, k por konekti nin kun la superaj partoj de l'centroj, k kun la superaj centroj mem.

LA 3 KLASOJ DE NUTRAĴO POR LA HOMA ORGANISMO

"Lernu disigi tion subtilan el tio kruda." -ĉi tiu principo el la TABELO DE SMERALDO- rilatas al la laboro de l'homa fabriko, kaj se homo lernas "disigi tion subtilan el tio kruda", nome, levi la produktadon de fajnaj hidrogenoj je ĝia plejble alta nivelo, per ĉi tiu fakto mem, kreas por si mem la eblecon de interna kresko, kiu povas esti certigita per neniu alia rimedo. La interna kreskado, la kreskado de l'internaj korpoj de homo (astrala, mensa, kaŭza) estas materia procezo komplete analoga al la kreskado de l'fizika korpo.

Ĉiuj substancoj necesaj por subteni la vivon de l'organismo, por la psika laboro, por la superaj funkcioj de la konscienco k la kreskado de l'superaj korpoj, estas produktataj de la organismo, ekde la nutraĵo, kiu penetras ĝin.

La homa organismo ricevas 3 klasojn de nutraĵo:

- 1^a La ordinara manĝaĵo, kiun ni manĝas.
- 2^a La aero, kiun ni spiras.
- 3^a Niaj impresoj.

Ne malfacilas kompreni ke aero estas klaso de nutraĵo por la organismo. Sed unuavide povas ŝajni de malfacila kompreno kiel la impresoj povas esti nutraĵo. Ni devas memori ke kun ĉiu ekstera impreso, sona, vida aŭ flara, ni ricevas elekstere iun kvanton da energio, iun nombron da vibradoj; ĉi tiu energio, kiu penetras elekstere, estas nutraĵo. Eĉ pli, kiel jam dirite, la energio ne povas esti transsendata sen materio. Se ekstera impreso enkondukas kun si eksteran energion en la organismon, tio signifas ke ankaŭ ekstera materio penetras en la organismon k nutras ĝin, en la plena senco de ĉi tiu vorto.


Por normala ekzistado, la organismo bezonas 3 klasojn de nutraĵo: manĝaĵo, aero kaj impresoj.

La procezo transformi la substancojn, kiuj eniras en la organismon, en pli fajnaj substancojn, estas regata de la leĝo de oktavo. Ĉi tie ni reprezentas la homan organismon en la formo de 3-etaĝa fabriko:

KAPO
BRUSTO
VENTRO

FORTO


C = KARBONO : aktiva
 O = OKSIGENO : pasiva
 N = NITROGENO : neŭtraliga



1^a TRIOPO

La manĝaĵo eniras kiel Oksigeno (768) -pasiva forto- kaj trovas la Karbonon 192, jam ĉeestantan en la organismo (indikita per la cirklo kun radioj). De la kuniĝo de O 768 kaj C 192 rezultas la Nitrogeno 384. N 384 estas la sekvanta noto: RE.

ALDONA KLARIGO: Supera forto (aŭ materio) aganta super malsupera forto (aŭ materio), levas la malsuperan al e tapo kiu estas transe de tiu antaŭa, sed ne je la nivelo de la aganta forto, nome, aktiva forto aganta super pasiva forto, estigas (inter)mezan forton (neŭtraligan aŭ ekvilibrigan), ekzemple: La manĝaĵo, kiu kondukas la pasivan forton, eniras en la stomakon; la aktiva forto ĉeestanta en la korpo (kiel Karbono) agas super ĝi kaj el tio rezultas (inter)meza forto:




2^a TRIOPO

La Nitrogeno (RE 384), -Neŭtraliga forto en la 1^a triopo- transformiĝas en la Oksigenon (pasivan forton) de la 2^a triopo; en la organismo ĝi renkontas la Karbonon 96, k ambaŭ produktas la Nitrogenon 192, nome: MI 192.



H 192 AERO



3^a TRIOPO


Laŭ la Leĝo de oktavo, MI ne povas pasi al FA en alsupra oktavo sen aldona ŝoko. En la momento en kiu MI 192 ŝajne devus atingi neefikan punkton, eniras en la organismon la "2^a nutraĵo": la AERO, en la formo de DO 192, nome, MI, RE, DO de la 2^a kosma oktavo de radiado. La noto DO enhavas la necesajn duontonojn, nome, la necesan energion por pasi al la proksima noto, donante parton de sia energio al la NOTO MI, de egala denseco, kiu kun la Karbono 48 (jam ĉeestanta en la organismo) produktas la N 96, aŭ FA 96.

La 4^a, 5^a kaj 6^a TRIOPOJ de la oktavo de manĝaĵo jam ne postulas eksplikon. (Vidi respektivajn diagramojn):

4^a TRIOPO

5^a TRIOPO

6^a TRIOPO





La oktavo de AERO fariĝas similmaniere:

1^a TRIOPO

2^a TRIOPO


(*)-ĉi tie-



(*)-ĉi tie- (je MI 48) haltas la oktavo de AERO, kaj en la ordinariaj kondiĉoj de la vivo, ĝi ne plu disvolviĝas.

LA IMPRESOJ eniras kiel DO 48, k en la normalaj kondiĉoj de la ekzistado, ili ne pasas de tie. Nome, la produktado de fajnaj materioj troviĝas en neefika punkto.

OKTAVO DE IMPRESOJ



La 3^a oktavo aŭ oktavo de IMPRESOJ komenciĝas per DO 48. (kiu eniras kiel Ok-sigeno 48 -LA, SOL, FA- de la 2^a kosma oktavo SUNO-TERO).

En la momento kiam DO 48 eniras en la organismon, ne prezen tiĝas la Karbono 12, kiu necesas por transiri al la noto

venonta, kaj DO 48 ankaŭ ne kontaktas kun MI 481 (Tial la oktavo de AERO haltas; sekve, la 3^a oktavo resonas nur kiel DO.

1^a KONSOCIA ŜOKO

Ĉi tie necesas "artefarita ŝoko", kiu konektigas ĉe ricevo de impresoj. DO 48 signas la momenton en kiu impresoj eniras en nian konsciencan. Artefarita ŝoko signifas fortostreĉon faratan en la momento kiam oni ricevas impreson.


En la ordinara vivo NI NE MEMORAS PRI NI MEM, nome, ni ne havas la sensacon pri ni mem: ni ne estas konsciaj pri ni mem en la momento de l'percepto de emocio, de penso aŭ de ago. Se iu persono komprenas tion, kaj provas memori pri si, ĉiu impresoj, kiuj li ricevas dum tiu memoro, estos iel dublita, duobligita. Ekzemple, en ordinara stato psika, mi nur rigardas la straton. Sed se "mi memoras pri mi", mi ne nur rigardas la straton, sed ankaŭ sensacas ke mi rigardas ĝin, kvazaŭ mi dirus al mi mem: "Estas MI kiu rigardas", aŭ: "MI rigardas". Anstataŭ unu impresoj pri la strato, mi havas du impresojn: unu pri la strato kaj la alia pri mi mem rigardanta la straton. Ĉi tiu 2^a impresoj estigita de la fakto de mia "memoro pri mi", estas la: ALDONA ŜOKO. (1^a konscia ŝoko), krome, okazas ke la aldona sensaco en konekto kun la MEMORO PRI SI, alportas kun si elementon de emocio; alivorte, en tiu momento la laboro de la homa maŝino altiras iun kvanton da Karbono 12, per kio la oktavo de impresoj povas daŭrigi antaŭen. (Vidi la sekvan diagramon)

Aliflanke MI 48 povas ricevi la energion necesan por pasi de MI al FA, kaj kompletigi la oktavon de aĉro ĝis LA 6, la materio de plej alta kvalito produktata de la organismo per la aĉro. Sed ĉi tion oni povas atingi nur per konscia fortostreĉo, farata en la momento en kiu oni ricevas impreson.

2^a KONSOCIA ŜOKO

La 1^a konscia ŝoko koncernas la transformadon de impresoj. La 2^a konscia ŝoko koncernas la transformadon de negativaj emocioj.

La 1^a kaj 3^a oktavo (la oktavo de manĝaĵo kaj tiu de impresoj) ne povas daŭrigi. Mankas 2^a konscia ŝoko, por ke MI transiru al FA (en la oktavo de impresoj), kaj SI pasu al DO (en la 1^a oktavo).



La 2an konscian ŝokon oni atingas per la praktiko de la neesprimado de malagrablaj emocioj, de la ne-identigo, de la ne-interna konsidero.

La alĉemiistoj (mezepokaj) parolis pri ĉi tiu transmutacio sub la alegoria formo de transmutacio de malsatindaj metaloj en altvalorajn metalojn. Ili aludis pri la transformado de krudaj hidrogenoj en fajnajn hidrogenojn, precipe MI 12.

LA KONEKTO KUN LA SUPERAJ CENTROJ

En la 4^a vojo, korekta disvolviĝo de l'centroj devas komenci per la 1^a volonta "ŝoko" (=1^a konscia ŝoko), kaj poste transiri al la 2^a (konscia) ŝoko, kiu devas interveni en MI 12 kaj SI 12, per kio oni atingas la transformiĝon aŭ transmutacion de ĉi tiuj hidrogenoj en superajn hidrogenojn.

Tiuj ne disvolviĝintaj estas la MALSUPERAJ CENTROJ, kiuj nekomplete funkcias k malebligas al ni uzi la laboron de l'superaj centroj: la SUPERA EMOCIA CENTRO, kiu laboras per Hidrogeno 12, k la SUPERA INTELEKTA CENTRO, kiu laboras per Hidrogeno 6.

La intelekta centro laboras per Hidrogeno 48, la motora centro per H 24, same la emocia. Se la emocia centro laboras per H 12, ĝia laboro konektiĝus kun tiu de la SUPERA EMOCIA CENTRO. Rilate la SUPERAN INTELEKTAN CENTRON, ĉar ĝi laboras per H 6, ĝi estas eĉ pli fore de ni, eĉ malpli atingebla. Ne eblas kontakti ĝin, se ne estas tra la SUPERA EMOCIA CENTRO. Ekzemplo de tiaj kontaktoj estas la mistikaj spertoj, la statoj de ekstazo (kiuj similas al la seksaj sensacoj), kiujn oni ne povas esprimi per vortoj; se ni provas tion fari, niaj malsuperaj centroj rajtas esti komparataj kun blinduloj parolantaj pri koloroj, aŭ surduloj parolantaj pri muziko!

Resume kompilis: ERGOTO DE BONAERO

La venonta numero aperos meze de junio

ĈIES VOĈO

GAROLO brile defendas ateismon. Post legado de lia artikolo "Preter la stulteco de dikredado" en L!92 oni pensas: Jes, vere li skribis ĉion direndan. Lia emfazo estas tiu de predikanto kaj li facile povus varbi anojn.

Sed liberpensuloj respektas la opiniojn de aliuloj. Ili klare vidas kaj konstatas, certe ili ne diras, ke tiuj estas stultuloj pro siaj diversaj kredoj.

Ateisto povas esti ankaŭ kredanto, ne je tiu persona dio, kiun religioj misuzas por submeti siajn adeptojn, sed je tiu, kiu nomiĝas: Naturo - Eterneco - Universaleco - Pleneco - Nekonado.

**

J. DEKER estas ĝentila kiam li skribas, ke la artikoloj de Ergoto de Bonaero povas interesi iujn.

Tio ne estas la opinio de la revuo "Esperanto", kiu skribis lastatempe:

"ERGOTO : NEVENDOTO?"

Atentaj legantoj de nia rubriko Laste aperis aŭ de la revuo Laŭte! jam konatiĝis kun la nomo Ergoto de Bonaero. Plurfoje jare tiu poldevena argentinano, en la privata vivo Adam Hryniewicz, ŝutas sur nin novan mikspoton de versaĵoj, meditoj kaj nedifineblajoj. Sed ĉu li havas publikon? UEA provizore ĉesis mendi liajn verkojn pro manko de aĉetoj. Tial, nia sola mencio pri la apero de "Bunta paletro" kaj "Fajna marketro" estos tiu ĉi. Ŝatantoj ne bezonas priskribon, kaj la aliaj... jam turnis la paĝon."

**

Ne, MEVA MARON, sentemo ne estas ekskluzive propraĵo de iuj. Racio havas sian sentemon - ne afektan sentemon.

Kiu konas la novelon "Florville kaj Courval" aŭ "Fatalismo" el la libro "Krimoj de l'amo" de la ateista

markizo de Sade?

Jen teksto, kiam fraŭlino Forville rakontas sian viziton al la mortonta sinjorino de Verquin:

"Venu pli proksimen, Forville, ŝi diris al mi, kisu min supre de mia lito plena je floroj. Vi iĝis granda kaj bela. Ho! verdire, mia infano, virto sukcesis al vi. Ĉu oni parolis pri mia sanstato al vi, ĉu vere, Forville? Ankaŭ mi, mi scias ĉion. Post kelkaj horoj, mi ne plu estos. Mi ne pensis povi revidi vin por tiel malmulte da tempo!

Post kiam ŝi estis vidinta miajn okulojn plenajn je larmoj, ŝi plu diris: ne estu stulta, ne agu kiel infaneto. Ĉu vi kredas, ke mi estas tiel forte malfeliĉa? Ĉu alia virino sur la mondo pli amuziĝis ol mi? Mi perdas nur tiujn jarojn, kiam oni devas forlasi ĉiajn plezurojn, kaj kiel mi povus vivi sen tiuj ĉi? Vere, mi ne plendas pro ne fariĝi pli maljuna; post ia tempo, kiu viro ankoraŭ volus min? Kaj mi nur deziris vivi la necesajn jarojn por ne inspiri malinklinon. Morto estas timota nur por la kredantoj, kiuj ĉiam staras inter infero kaj ĉielo, kaj neniam scias kiu el ambaŭ akceptos ilin; tia angoro afliktas ilin. Sed mi, kiu esperas nenion, kiu estas tiel certa ne fariĝi pli malfeliĉa post mia morto, ol mi estis antaŭ mia vivo, mi tuj trankvile ekdormos en la mezo de la naturo, sen bedaŭro, kiel sen doloro, sen memriproĉoj kaj timeto. Mi petis por esti entombigota sube de miaj jasmenoj: tie, jam nun, oni pretigas mian lokon, tie mi kuŝos, Forville, kaj atomoj el tiu ĉi korpo pereigita nutros kaj ĝermigos la floron, kiun mi preferis el ĉiuj. Ŝi alproksimigis jasmenan bukodon kaj ŝi plu diris: venontan jaron, kiam vi flaros tiujn ĉi florojn, vi spiros en ĝia mezo la animon de via eks-amikino, tiu parfumo iros ĝis via cerbo kaj donos agrablajn ideojn al vi, deviginte vin ankoraŭ pensi pri mi.

Mi tuj reploris; mi kunprenis la manojn de tiu malfeliĉa virino, kaj mi volis interŝanĝi tiujn timigajn ideojn pri materialismo kontraŭ kelkaj malpli malpiaj sistemoj; sed, kiam ŝi aŭdis tion, sinjorino de Verquin forpuŝis min kun teruro.

- Ho, Forville, ŝi ekkriis, mi petas vin ne veneni miajn lastajn momentojn per viaj eraroj, kaj lasi min trankvile morti; ne estas por alpreni ilin je mia morto, ke mi malamis ilin mian tutan vivon.

Mi silentis; mia malforta parolado estis maloportuna, mi estus

ĉagreninta sinjorinon de Verquin, sen konverti ŝin, kaj mi ne volis esti malhumana; ŝi sonorigis kaj tuj poste mi aŭdis dolĉan kaj melodian koncerton, kiu ŝajnis eliri el najbara ĉambro.

Tiu epikuranino diris: tiamaniere mi deziras morti. Ĉu ne pli bone ol esti ĉirkaŭita de pastroj, kiuj alportus malserenecon, afliktojn kaj malesperon je miaj lastaj momentoj? Ne, mi volas lernigi al viaj piuloj, ke sen simili al ili oni povas trankvile morti. Mi volas konvinki ilin, ke religio ne necesas por morti pace, sed nur kuraĝo kaj racio."

***** Edgard JAMART

PRI ATEISMO (L:92, p.26-30)

Ĉiam plezure mi legas Valo-n kaj aliajn pri la Dia "esti aŭ ne esti". Jes, estimata Garolo, gravas "mistika" aŭ "racia" temperamento.

Sed al ĉiuj komunas nia mistera riĉeco "io, kio pensas", diris Kartezio, tio estas io kio kalkulas ktp., sed "ankaŭ imagas kaj sentas".

Kvankam socie kaj praktike (ĝis kiam?) katolika, mi dum jaroj plu semis, ke Dio estas nenio alia ol tiu "Mi pensas, mi sentas, mi ĝuas" komuna al ĉiuj homoj.

Tial, beleco de Naturo gravas ne nur pro Naturo objektiva, sed ankaŭ pro la beleco-ĝuo: Kia la "miraklo de orgasmo" en Anna de Auld, ĝi alvokas al ama dankemo. Pro la eblo tiam danki, "ne bezonas masturbi sin (...) en la naturo" la kredantoj. Se masturbo estas malplezuro de senkunula plezuro, kiu plezuro por la naturbelece ĝuanta ateo?

Valo, Garolo, ĉu vi deziras babili kun mi?

Kore, F. Degoul.

Pri artikolo de Oksana (L:92, p.22)

Mi tute konsentas kun Oksana kiam ŝi skribas: "agacas min esperantista malsano "reformemo". Iel multaj ĵus bakitaj esperantistoj ne volas konsentiĝi pri la lingvo tia, kia ĝi estas..." Sed... kio estas "ŝulcaĵoj", kiu estas "ŝulcisto"? Si uzas tiujn vortojn en la unua paragrafo. Mi ne estas lerta esperantisto sed mi scipovas kontroli en PIV. Nenie mi trovis klarigojn pri tiuj vortoj.

Ferdi VINCE

Alvoko de la red.: kiu bonvolu klarigi?

PRI ŜANĜOJ EN LA LINGVO

(vd. L'92 p.15/25)

De la komenco, same kiel la aliaj vivantaj lingvoj, esperanto evoluis.

Unue, la vortprovizo riĉiĝis: la Universala Vortaro entenis en 1905 2635 radikojn. Kvar jarojn poste, 812 novaj radikoj estis enkondukitaj. La nombro regule kreskis. En 1953 la Pleva Vortaro entenis 7866 radikojn. Nun estas pli ol 10 000. La riĉiĝo okazas per du faktoj: novaj radikoj kaj kombinoj de internaj elementoj estas laŭ mi la natura evoluo de la lingvo, kiu devas esti kapabla esprimi ĉiujn nuancojn de la penso.

Ankaŭ novaj sufiksoj eniris: **aĉ, ism, ind, end** ktp.

Ankaŭ terminoj de vortoj ŝanĝiĝis: artikolo, asocio, komisiono anstataŭis: artikulo, asoziacio, komisio, ktp. Sed la baza sistemo ne perdiĝis. Kaj esperanto konservis sian unuecon kaj ne dialektiĝis kiel la aliaj lingvoj.

Laŭ mi, se estas akcepteblaj kelkaj formaj modifoj, la fundamentaj gramatikaj reguloj devas resti netuŝeblaj, ankaŭ la strukturoj de la lingvo, la maniero formi la kunmetitajn vortojn. La neologismoj devas obei la ĉefajn kvalitojn de esperanto: logikecon, klarecon.

Evoluo, riĉiĝo, certe; modifoj de la bazaj strukturoj, ne.

***** J.G.

Nova leganto de L!, Rafael MARGALEF, skribis jenon al la redaktejo:

Mi legis Laŭte n-ron 92, kiu multe plaĉis kaj konsolis al mi, ĉar antaŭe mi legis en "Sudfrancia Stelo":

"... Alia leganto prave skribis: "Ni evitu inter esperantistoj diskutojn pri politiko kaj religio!..."

Tiu leganto tiel parolis sendube sen kaŝita penso. Sed je kio utilos Esperanto kiam ĉiuj parolos ĝin, se, samtempe, la homoj ne estas edukitaj por bone diskuti? Ĉu ankoraŭ estas esperantistoj, kiuj eĉ ne scias diskuti pri religio, kiam la plej inteligentaj homoj jam delonge trovis la formulon "Konsciencilibereco kaj eldirlibereco"?

Amiko Rafael estas ja komencanto, al kiu certe ne estis klarigite pri la neŭtraleco de granda parto el la esperanto-asocioj. Kiuj deziras libere interdiskuti pri neneŭtralaj temoj, tiuj povas tion fari en specifaj asocioj, ekzemple Sennacieca Asocio Tutmonda, en la revuo MONATO, kaj kompreneble en gazetoj similaj al Laŭte.

BLANKAJ MERLOJ KAJ PAPAGAJ GAROLOJ

Replike al Oksana kaj Meva Maron - Laŭte n°89-90-91

Ano al fromaĝo.

Dankon, Oksana pro la dediĉo de via "Tagmeza Medito pri Najbaroj kaj pri amo al homaro".

Mi konfesas al vi ke unualege mi tute ne komprenis la motivon de via dediĉo. Nur post kiam mi legis vian respondon "Pri homaj bezonoj" paĝo 15 n°91 mi sentis vian intencon, kaj vere mia persona amo pli facile iras al fromaĝo, barĉo, greka plado, merlo (nespecife blanka) aŭ garolo (kiu papagas jes, kiu miaŭas ne!) ol al la homaro.

Pri via tagmeza medito, mi akompanis plene vian turmenton kaj entute kaptis vian malamon al najbareco, mi kvazaŭ ĝin kun vi travivis ... sed jen la diferenco inter vi kaj mi, mi neniam, neniel, nenial (la ripeto de negativo estas intenca) akceptus loĝi en ĉielskrapa turo. Kaj notu bone, ke en mia infera urbo (São Paulo) estas centoj, miloj kaj miloj da tiuj konstruaĵoj (domoj ne estas) kiujn mi povus selekti kaj elekti dum en via ĉarma urbeto vi konfesas, ke estas nur unu, nur 17-etaĝa; kaj vi ĝuste falis en ĝin. Sincere mi ne komprenas vian mistikan sinteton kaj mi ne povas racie akcepti vian plendadon. Senkulpigiu min.

Merloj kaj Garoloj

Kiel Kelto, dum mia infaneco mi loĝis en eŭropa kampara vilaĝo. Tre ofte akompanante mian avinon aŭ patrinon, mia frato kaj mi vizitis la geonklojn aŭ geavojn, je distanco de pli ol 12km kiun ni piede venkis. Inter la du vilaĝoj estis pliaj vilaĝoj, unu el ili, la plej interesa, estis (ankoraŭ estas) "Le Merle Blanc" (La blanka Merlo). Ĉiufoje la sceno estis la sama: malkovri la blankan merlon ... kiom da legendoj, kiom da historioj dum tiuj piediradoj! Kiom da fojoj ni pridemandis la loĝantojn; kaj ni rigardis al ĉiuj arboj, je ĉiu arbusto aŭ heĝo. Ĉefe dum vintro, kiam ĝuste la merloj (nigraj) aŭ la merlinoj (preskaŭ grizaj ... sed tute ne albinaj) sin protektis en la foliaro de ileksoj (ne de uleksoj, kiuj havas nur domojn) kaj frandis, iel devige, la ruĝajn berojn. Neniam ni vidis, neniu sukcesis montri albinan, blankan

merlon spite al la nomo de la vilaĝo. Sed estas tre ĝojige vidi merlon (nigran) sur ilekso ... kaj tio okazis tute sen envio al Meva Maron, kiu kapablas vidi "albinan merlon sur Ulekso". Mi admiras la lertecon vian (karaĵ Oksana kaj Meva Maron) por ordigi la vortojn (ne nur ĵonglado ĉu ne?) en harmonia prozo aŭ ritmaj versoj ... pri mia komprenado el tiuj labirintaj esprimoj mi ne opinias ĉar mi estas simpla homo, kiu, kiel Garolo, papagadas.

Efektive mi bone amikiĝis kun la garoloj, tiuj povraj birdoj, kiuj insistis por viziti la legomgardenon cele al la pizoj, fazeoloj k.a. Mi prefere al mortigado enkaĝigis ilin kaj rapide sukcesis disciplinigi la kriĉadon al imito de homaj sonoj. Estas necese ilin izoli unu de la aliaj, kaj, en duonmallumo, dum longaj dekoj da minutoj, trankvile ripeti la vortojn ĝis kiam la kapplumoj hirtiĝas, tiam la garolo iom post iom eligas la sonojn kaj kapablas rapide "lerni" eĉ pli bone ol sud-amerika papago. Tre grava estas la nutrado kaj la preferata plado ne estas unu el la 365 fromaĝoj de la francoj, kompreneble; la garoloj ŝategas jahurton, freŝe kazeigitan lakton, kiun mi mem zorge preparis. Tiel, miaj garoloj, malmulte kriĉis, ne imitis la katojn, do ne miauis, sed ofte bojis kaj en amuzaj hontigoj eniris la babiladon de la vizitantoj ... kiam ne temis pri lacigaj ripetadoj de nomoj kaj de maldecaj frazeroj. Pro tio, ankaŭ mi, G. R.L. omaĝe al miaj garoloj, gurde, papage ripetas miajn ideojn, dum oni dirigas al mi tion, kion mi neniam pensis ... kiel al garolo!

Ekvivalenteco kaj sameco

Samaj kaj egalaj, globe, estas la homaj karakteroj kaj kvalitoj laŭ scienca analizo, sed en la sintenoj kaj kondutoj, feliĉe la homaj agadoj estas nur similaj kaj ekvivalentaj. Tiel pro la ekvivalenteco, la interplektado de homaj valoroj estas ebla kaj konstrua. Por tion konscii sufiĉas viziti, Usonon, Aŭstralion kaj ĉefe Brazilion, kie la valoroj de ĉiuj civilizacioj manifestiĝas en riĉigo de la kulturo. Trafa ekzemplo estas la brazilia karnavalo, kie aperas la homaj malvirtoj, ĝuemoj kun la okcidentaj artoj kaj teknikoj miksitaj al la afrika mis-

tiko, muzikoj, ritmoj, ritoj ktp. ... finfine interplektado de valoroj. Mi ne parolas pri belo-malbelo, bono-malbono, ĉar same kiel dio-diablo, amo-malamo, por mi tiuj nocioj ne havas precizan signifon.

Resume: mi ne amas la homaron, mi nur opinias, ke por ebla kunvivado devas ekzisti tolero kaj respekto de ĉiu kaj ĉiuj. La franca revolucio ja akcelis la modernan miton: kolektiveco, kiun mi papage, garole denuncas, ĉar la devizo: Libereco, egaleco, frateco estas absurda, ne aplikebla. La vorto frateco, prezentas mistikan subjektivecon, kiu per racio ĝuste estas tolero kaj respekto. Egaleco estas same absurda ĉar la homoj feliĉe ne estas egalaj en siaj individuaj praktikaj agadoj kaj kapabloj, tiel en la socio la "sociala justo" nur povas konduki al ebleco de samaj oportunoj por la homaj agadoj cele al vivtenado. Estas la kolektiveco kiu falsis la valorojn, ne mi ... kaj ĉiuj atendas la solvojn el la monstra ŝtato. Pri la libereco, mi diras kun Henri Lepage kaj Murray Rothbard ke "La libereco estas la devo fari tion kion oni deziras ... per tio kion oni havas". Tiam la devo nuligas la absurdan rajton de la mitoj, la deziro estas la neceso de agado por la propraj bezonoj kiuj estas la limo de agado mem en la proprietado de tion kion oni havas (sen proprietado ne ekzistas libera agado: ekzemple 70 jaroj de komunismo en Sovetio); kio kondukas al respekto de tio kion oni ne havas. La interhomaj kontraktoj ja tiel eblas, la konfliktoj malpliĝas ... kaj la parazitoj, malvirtuloj, rubhomoj mortas. Ni ja povas apliki la solidaron, sed ne la almozon. Jen terura moralo sed tiel estas, ĉar kiel vi ambaŭ diris, nia mondo ne povas esti perfekta ... la ŝtato, senutila, ankaŭ ne.

Obskurantismo estas vorto kiu tuŝis vin ambaŭ. Ĝi estas nur mensa albinismo en nia kolektiveca socio, kie ĝuste la homoj sin streĉas malpli ol la cititaj merloj kaj garoloj; dume mi hontas esti homo meze de homoj kiuj perdis sian naturan kapablon por sin defendo kaj vivteno. Mi hontas esti homo fronte al la analfabetoj, (vidu la ilustraĵon) kaj ĉar vi citis Arnold Toynbee rilate al la irlanda lingvo, tiu sama Toynbee diris: "La plej granda puno por la homoj, kiuj ne havas intereson pri poli-

NI SAVU LA LINGVON

(L! 92)

Kanto de Maurice Chevalier diras: "Kiam vicgrafo renkontas alian vicgrafon, kion ili preparolas? Vicgrafajojn". Kiam esperantistoj renkontiĝas, kion ili pritraktas? Kompreneble la evoluon de la lingvo; pro tiu temo ili metas la pacpilon en la tirkeston, akriĝas la sagojn, elterigas la milithakilon kaj... ridindiĝas nian lingvon.

La problemo ŝajnas al mi tamen ja simpla: Esperanto estas kaj devas resti la lingvo kreita de Zamenhof kaj, ĉar ĝi celas esti komunikilo inter la homoj de la tuta mondo, oni ne rajtas ne respekti la fundamentajn regulojn. Nome, tiu fundamenta bazo estas konvencio kiu ebligas al ĉiuj esperantistoj esti hejme en la lingvo parolata kaj skribata de la tuta samideanaro. Ne respekti la 16 regulojn estas perfidi la lingvon, la celon de Zamenhof kaj la movadon.

En sia teksto "**Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia**" Zamenhof, sub la kaŝnomo Unuel, skribis: Arta lingvo distingiĝas per la sekvantaj ecoj:

1. Ĝi estas miriginde facila por ellernado
2. La dua eco estas ĝia perfekteco kiu konsistas en matematika precizeco, fleksebleco kaj senlima riĉeco.

Aliloke, en **Lingvaj Respondoj**, li skribas: "La vera stilo Esperanta estas - aŭ almenaŭ devas esti - nur stilo simpla kaj logika."

Ĉu tiuj tri sencoj ne estas sufiĉaj por difini la kardon en kiu ni rajtas uzi la lingvon?

La unua punkto estas ege grava. Ĝi implicas la neceson ne grandigi la vorttrezoron per senutilaj novaj vortoj, kies sencoj oni povas esprimi per kunmetaĵo aŭ grupigo de jam ekzistantaj vortoj. Oni utile relegu la Ĝeneralan Antaŭparolon de P.I.V.

Necesas, ke la lernado restu facila kaj kuŝu en la komprenpovo de ĉiuj homoj. Se ni deziras vere demokratian kaj internacian lingvon, ni nepre devas malpermesi al la esperantistaj plibonigantoj transformi nian lingvon ĝis ĉinia pacienculo. Esperanto estas ĉies proprietaĵo kaj ĉiu devas respekti kaj defendi ĝin.

La duan punkton mi mallonge pritraktos, ĉar temas pli pri la fako de la lingvistikistoj. Mi nur rimarkigos al la legantoj, ke la sistemo de la Zamenhofa vortfarado ebligas perfekte esprimi ĉiujn komprenaĵojn, eĉ novajn. La kunmetitaj vortoj estas tuj kompreneblaj de ĉiuj, ĉar ili priskribas la komprenaĵojn. Ekzemple: VAPORKUIRILLO estas multe pli preciza ol la angla vorto: STEAMER (uzata ankaŭ en la franca).

"Stilo simpla kaj logika", postulis Zamenhof. Tio tute ne signifas, ke verki esperante estas simpla tasko. Male! WANG CHUNG, ĉina verkisto el la unua jarcento p.k. jam diris: "La literaturo devas esti facile komprenebla kaj malfacile verkita." Do, kiam, relegante sian tekston, oni malkovras malklaraĵojn, neprecizaĵojn, malofte uzatajn vortojn ktp., oni relaboru, poluru, simpligu tiel ke la meza leganto ĉerpu plezuron el la legado.

Esperanto estas nenies denaska lingvo kaj pro tio ĝi ne permesas al la aŭtoroj aŭdacajn novigaĵojn. Kiuj, en nacia lingvo, ne estas malkonvenaj, kvankam ĉiuj stilistoj malkonsilas troan uzon de lingvaj kuriozaĵoj. Oni ne verku por verkistoj kiujn oni deziras mirigi, sed por publiko tiom vasta kiom eble. "Ve al la artaj produktaĵoj, kies beleco celas nur la artistojn" diris la franca verkisto d'Alembert.

Dum mi laŭdas la simplecon, mi, kiu fakte posedas nian literaturan rajtigitan aŭtoritaton, tamen dezirus humile sugesti al la verkistoj, kiuj devas uzi vere tre maloftajn vortojn, komprenigi al la legantoj la signifon de tiuj vortoj ne per glosaro, sed per la teksto mem. Plej ofte, sufiĉos adjektive aŭ adverbe uzi tiujn vortojn antaŭ pli larĝenca esprimrimedo. Kelkaj ekzemploj klarigos mian sugeston:

Triremo : trirema ŝipo

Apanaĵo : apanaĝa bieno

Arkonto : arkonta estrarano

Koheri : kohere konsisti

Moduli : module variigi

Nuanci : nuance gradigi ktp.

Sen forlasi la originalan radikon, tia skribmaniero permesos al la legantoj daŭrigi la legadon sen tuja kontrolo de tiaj vortoj en glosaro aŭ en vortaro.

Respektante tiujn kelkajn principojn oni ne malutilos al nia kara lingvo kaj, trafante du celojn per unu bato, oni demokratece agos.

La lastajn vortojn mi lasos al André Gide, alia franca verkisto: "Mi provis cedi la lingvon; mi ne estis kompreninta kiom pli multe oni lernas, cedante al ĝi".

Henri CASTIAU

LINGVAJ ANGULOJ...

ONI IĜI SKRIBIS:

* ... al kiuj... provizis printempan donacon = al kiuj... preparis printempan donacon. En PIV vere estas kiel 3a senco menciita la supra maniero, sed ĝi kontraŭas la 1-an senco kaj donas argumentojn al goldenuloj aserti, ke Esperanto ne estas simpla.

* Ekzistas aliaj broŝuroj (). Bv. informi al la kasisto = (versajne) bv. peti informon de (ĉe) la kasisto. "Bv. informi kasiston" ne ŝajnas al mi esti vere intencita. Se oni volus nepre uzi la prepozicion "al", oni devus diri "bv. sendi peton pri informo al la kasisto."

* Akceptiĝis la plano = estis akceptita la plano, akceptitis la plano. La plano ne iĝis akcepta aŭ akcepto. "-iĝ-" povas signifi nur la senvolan ŝanĝon. Vidu la Lingvajajn respondojn de Zamenhof pri la vorto "sidiĝi". Oni akceptis la planon, la plano estis akceptita. La kunigo de la helpa verbo "esti" kun la participo ne estas kutima, sed ĝi harmonias kun la esperanta gramatiko. La latina lingvo uzas ĉi manieron: laŭdetur = estu laŭdata, imprimatur = estu presita.

* Atesto al Palestinano = atesto de Palestinano. Neniu el la 6 sencoj de "el" en PIV signifas ĉi manieron.

* mi translokis la librojn = mi translokiĝis la librojn. La libroj lokas en la nova ejo, tie ili estas lokaj. (*)

* Noto de Kribo: Ĉar, en PIV, loki = meti en iun lokon, mi opinias ke ĝustas la unua frazo.

* mi demandis al mi = mi demandis min. Vidu PIV.

* li ne devas iri: evidente ĉi tie oni volis diri, ke ne estas al li permesite iri. Tamen kiu ne devas, tiu tamen povas, al tiu estas nek ordonite nek malpermesite iri. Plej bone oni dirus "li ne darfis iri", tamen iuj esperantistoj ĉi tre bezonatan vorton obstine rifuzas. Tiuj do almenaŭ diru "devas ne iri".

* troviĝas: ĉi tiu vorto estas simile malĝusta kiel "sidiĝi", pri kiu skribis Zamenhof en siaj Lingvaj Respondoj. Ĝin povas anstataŭi diversaj verboj, laŭ cirkonstancoj. Iam taŭgas "troveblas", iam simple "estas".

* oni ne fieriĝas esti justa aŭ ne = oni ne estis fiera kaj ankaŭ ne estos fiera, restos esti tia, kia oni ne estis antaŭe, oni ne fieras kaj ne fieros.

* forto, je kiu ni ne estas senseblaj: vidu PIV, kie vi povas konstati, ke ekzemple por blindulo aŭ nokte ni estas senseblaj nur per parolo aŭ fortaodoro. Homo estas sensema, iu pli, iu malpli.

* Post la halo estas placo, placo inter la antaŭaj haloj kaj postaj kortoj. La prepozicio "post" estas nepre prepozicio tempa, ne loka. Kiam Zamenhof uzis "post" en senco "malantaŭ", temis pri manieroj eksperimentaj, kia estis ankaŭ la vorto "sidiĝi". En PIV la frazpartoj "vi flugu ĉiam post mi" kaj "eliri post iu" vere apartenas inter la ekzemplojn sub "Post I 1. Movo postulas tempon, tial en tiu kazo taŭgas "post". Se oni dirus "flugu malantaŭ mi" povus eventuale signifi la situon "flanke" = kaŝita antaŭ la kontraŭflanka rigardo.

* fotoj perdiĝis = fotoj perditas. La fotoj ne iĝis aliaj, ili simple malaperis, oni perdis ilin, do ili estas perditaj, ili perditas. La vorto apartenas al la grupo, kie oni ne uzadu la afikson -iĝ-, kiun oni rezervu por la senvola ŝanĝo. En tiu grupo oni aŭ uzas la prefikson ek- (sidiĝi = eksidi) aŭ la sufikson de pasivo: perdatas = perdiĝas, perditas = perdiĝis, perdotas = perdiĝos.

Marie Bartovska

FORIGI LA BARILOJN - KIEL?

Respondo al Renata (L! 92)

VE! Mi opiniis ke mi kiel eble plej klare montris mian rilaton al vaskoj, bretonoj, katalunoj, korsikanoj. Mi skribis ke ili estas "franciaj civitanoj" (bv. kontroli) - ne francaj. T.e. civitanoj (= ŝtatanoj) de Respubliko Francio. Alia parto de vaskoj kaj katalunoj estas civitanoj de Hispanio. Tamen, ambaŭflanke de ŝtataj limoj (Francio-Hispanio) troviĝas samnaciaj. Tiuj ĉi du nacioj (vaska kaj kataluna) estas dividitaj kaj kompreneble, ke mi simpatias ilin kaj deziras al ili akiron de propraj ŝtatoj. Samon mi deziras al kurdoj (kiuj troviĝas en eĉ pli komplika situacio), al palestinanoj, altibetanoj kaj aliaj. Guste por tio mi estas membro de IKEL (Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj). Kio rilatas miajn esperantistajn spertojn, mi konstatas ke mi neniam havis problemojn pri interkompreniĝo kun koncernaj nacioj (senŝtataj) dum kun t.n. grandnaciaj problemoj kaj miskomprenoj abundas.

Pri plendemo. Nek riproĉo, nek laŭdo. Mia eldiro estis simpla konstato, eble erara. Ja klarigo al tio estas simpla: homo en demokratia lando ne timas plendi. Neniu povas aresti Renatan pro ŝiaj plendoj (pro "kontraŭfrancia agitado kaj propagando"! kaj sendi ŝin "redukiĝi" en Kanakion aŭ alian foran parton de l'imperieto. Homoj en Sovetio suferegis tiom da, ke ili timis plendi laŭte. Tio eniris sangon - kaj liberiĝi de ĝi ne estas tiom facile. Plendemulojn oni rapide sendis en "redukejojn" en Siberion. Legu pri tio en "Arkipelago Gulago" (PRO KIO oni arestis homojn). Nun ankaŭ homo sovieticus komencis plendi. Plendleteroj okupas tutajn paĝojn de sovetiaj gazetoj kaj revuoj. Prenu "Ogonjok" ("Fajrero") - tre popularan magazinon el epoko de "glasnosto" (t.e. "nekaŝemo"). Entreprenemaj anglaj eldonistoj ĵus eldonis kelkajn volumojn el leteraro de "Ogonjok" anglalingve. Bedaŭrinde, la Esperanta gazetaro estas tro malriĉa por sukcesi sekvi evoluon. Anglalingvano nun povas legi plendojn de sovetianoj. Kaj ilin valoras legi! Ekz. plendojn de malfeliĉaj gepatroj, kies sola filo pereis en fiaventuro en Afganio - sed ili nun DEVAS pagi ŝtatan imposton PRO SENINFANECO! (Jes, ekzistas tia imposto en Sovetio.

Virinoj, kiuj volas edziniĝi - sed ne povas, ĉar ne trovas serĉatan kunulon - dum jaroj pagas imposton, ĉar ili ne havas infanojn). Do, ĉiumonate la malfeliĉa patro vidas en sia laborlisto sumon, elkalkulitan el lia salajro "PRO SENINFANECO". Jen la sovetia sistemo.

Bedaŭrinde, kara Renata, vi tro esperis de "perestrojko". Por kompreni nunon, necesas scii historion. Necesas vidi en KIU STATO venis al perestrojko nacioj de Sovetio. Jardekoj de reprezalioj, kiam pereis la plej bonaj, kiam oni neniigis la intelektularon, kiam plej bonaj kamparanoj mortis pro malsato, ne pasis senspure. Krom tio, la nuna sovetia propagando sufiĉe sukcese prezentas ĉion kiel intertnajn batalojn, ne kiel batalojn kontraŭ komunista reĝimo. Jes, en multaj lokoj oni sukcesis provoki sangajn interbatiĝojn. Des pli, se mankas kleruloj, kiujn oni persiste neniiĝadis, kaj la vivnivelo estas mizerega, tio ne tiom komplikas. Temas ĉefe pri Mezzazio kaj Kaŭkazio. Eŭropaj respublikoj dume ne konas tiajn sangajn interbatalojn, kvankam ne mankas provokantoj de konfliktoj.

Por profiti sperton de Okcidento necesas koni ĝin. Kiel homo sovieticus, dum jardekoj ne povinta viziti ĝin, legi okcidentajn verkojn ktp., povas koni ĝin? Nur eta grupo de disidentoj havis tian literaturon. Kaj viziti Okcidenton antaŭ "perestrojko" povis nur membroj de la sovetia Nomenklature. Tial estas naive pensi ke sovetianoj povas tuj profiti sperton de Okcidento. Por tio bezonatas tempo.

Ankaŭ mi ne ŝatas barilojn inter homoj. Kiu ŝatas? Sed se "forigo de bariloj" aspektas jene: "rezignu pti vi, via originaleco, iĝu mia ombro, iĝu dua mi" - dankon, mi ne volas tian "forigon de baroj". La vojo kuŝas en konatiĝo, en reciproka estimo kaj agnosko, ke najbaro rajtas esti alia. Kompreneble, necesas lukti por plibonigo de homa ekzisto. Agacas min profetoj, kiuj tuj celas savi la tutan homaron - anstataŭ savi por komenco sian etan vilaĝon. Tial mi sarkasmas pri novaj rusaj profetoj, dezirantaj "Grandan Tutmondan Unuiĝon". Karaj, en la centro de Rusio centoj da vilaĝoj staras dezertigitaj. Veturu tien, kreu feliĉajn komunumojn, montru ekzemplon, kaj homoj venos lerni de vi. Sed ŝajne savi la tutan homaron estas pli interesa okupiĝo ol iuj vilaĝoj sen asfalto, sen iu ajn komforto...

Oksana

NE AL LA IMPERIO!

Responde al Igorj el Ruslando (L! 92)

16.03.1991

Jus mi revenis el Londono. Dum tri horoj en la Trafal-gara skvaro bolis manifestacio. Tenante siajn naciajn flagojn staris unu apud la alia estonoj, latvoj, litovoj, belorusoj, ukrainoj, poloj, rusoj, afganoj. Parolantoj sekvis unu la alian, dum paŭzoj oni kantis kaj dancis. Kio kunigis tian amason da homoj en la centro de Londono? Unusola deziro - disfalo de la lasta imperio en la mondo kaj liberigo de nacioj. Nomo de rusoj parolis fama poetino, multjara malliberulino en gulago Irina Ratuŝinskaja. Post ŝi - membro de litovia parlamento, ĵus veninta en Brition. Parolis ankaŭ anglaj politikistoj, reprezentanto de Skota Nacia Partio kaj multaj aliaj.

Mi divenas (laŭ prezentita "Vidpunkto") ke al Igorj el Ruslando tiu ĉi manifestacio ne plaĉus. Li jam pretendas scii ke liberigontaj landoj **"estos nedemokrataj, nestabilaj landoj kun (ve!) diskriminacio de "neoriginaj popoloj"** ktp. (legu daŭron en L! 92). Bedaŭrinde, Igorj tute ne referencas ankaŭ al **"okcidentaj historiistoj kaj politologoj"**, kiuj samopinias kun li. Sed nomas eĉ ne unu el ili. Jes, mi scias ke ne mankas en Okcidento dezirantoj gardi la imperion. Oni timegas novajn ŝtatojn, pravigante sian timon per vortoj: "Pli bone konata diablaĵo ol nekonata". Kiel diris ĉefo de Asocio de litovoj en Britio dum manifestacio, "diablaĵo tamen restas diablaĵo, konata ĉu nekonata". Krom tio, okcidentaj ŝtatoj, simile centrismaj kaj diskriminaciemaj kontraŭ siaj minoritatoj (mi pensas unuavice pri Francio kaj Britio) neniam vere akceptis USSR; por ili ĝi ĉiam restis malnova Rusia imperio. Kio fakte Sovetia imperio esras. "Blankmoskva" aŭ "ruĝmoskva" ĝi restas la malnova Rusia imperio.

Hodiaŭ ĉiuj britaj gazetoj informas pri televida pledo de Gorbaĉov voĉdoni "jese" en la morgaŭa referendumo. Por "jesa" respondo li garantias pacon. Sed kiu kredas tion? Laŭ tiuj pecoj, kiujn mi legis, mi povas nur konkludi ke elpaŝo de k-do Gorbaĉov estis vestita en malnova rusŝovinisma vesto. Li ja adresis ĉiujn sovetianojn! Sed

kian rilaton, mi demandas, havas **"nia miljara ŝtato"** (!!!), kiun oni nepre devas konservi (!) al kazajoj kaj armenoj, uzbekoj kaj taĝikoj, kirgizoj kaj jakutoj ktp.? Nenian! Kies karan "miljaran ŝtaton" ili devas peni konservi? Tiuj nacioj havas sian propran historion, ne malpli antikvan ol rusoj. Ŝajne rusaj imperiistoj daŭre ne povas kompreni tiom evidentan fakton: ke iuj uzbekoj, iuj tataroj k.a. havas sian historion kaj siajn ŝtatajn tradiciojn. Do, la prezidanto de USSR parolas pri la rusa historio, pensante ke ĝi same karas por ĉiuj. Kiel eblas esti tiom blinda? Mi lasas flanken demandon pri tio kies princo estis Jaroslav la Saĝa, kiun citis k-do Gorbaĉov (marksismo-leninismaj klasikuloj ne plu taŭgas! Nun komunistoj komencas citi el la 12-a jarcento!) kaj kian rilaton havis rusoj (t.e. historiaj "moskvianoj") al Kieva Rusjo (**Rusjo**, mi petas!). Mi konscias pri komplikaj traduki la nomon de l'imperio. Fakte en aliaj miaj skribaĵoj mi kutime uzis la vorton **"Rusia imperio"** (vidu mian resumon de "Legante Leninon" de V. Solouhin en "Sennaciulo", julio-aŭgusto 1990). Konsentite - tio estas ĝusta traduko por "Rossijskaja imperija" - nomo, kiun donis al la imperio caro Petro la Granda en la 18-a jarcento (antaŭ tio temis pri "Moskvio").

Ajnan imperion konstruas multaj popoloj. Kompreneble, ke Rusia imperio ne povus ekzisti tiom longe (kiel cetere ĉiu alia imperio), se inter koloniitaj popoloj ne troviĝus sufiĉe da kunlaborantoj kaj lakeoj. Tial pri ĉiuj plagoj de Ukrainio ne kulpas nur rusaj imperiistoj (pli kutima nomo "moskali", t.e. moskvianoj), sed ankaŭ lokaj kunlaborantoj, malestime nomataj de ukrainoj "malgrandrusoj". Samo rilatas marionetajn reĝimojn en alivestita Rusia imperio - Sovetia. Ĉiu unia respubliko havis sian marionetan reĝimon (kaj dume multaj ankoraŭ havas). Ke marionetoj estas ofte pli kruelaj kaj pli persistaj en imperiismaj streboj - estas konata fakto. Marioneta registaro de Ukraina SSR, ekzemple, havis ŝancon **homiĝi** dum teruraj tagoj en aprilo-majo 1986. Sed ne! Ili tremis pri sia haŭto kaj kaŝis informojn pri la skalo de la katastrofo en Ĉornobila AES.

Antaŭ kelkaj tagoj, dum vespermanĝo en loka anglikana preĝejo (antaŭ prelego pri saĝo Salomona), demandis min

unu anglo, kion mi pensas pri la nuna situacio en USSR. "Tiel malbone neniam estis", - diris li. Mi respondis: "Ne, estis multe pli malbone dum la 30-aj jaroj". "30-aj jaroj?" - miris li. - "Sed tiam ja ne estis tiom malbone ĉe ni." "Jes, ĉe VI! Sed ĉe ni milionoj mortis pro malsato! La jaro 1933 restas en la ukraina memoro kiel la plej terura jaro de ĉi tiu jarcento". Mi petas, ke Igorj detaligu **"kio estis Eŭropo en malbonmemoraj 1930-aj jaroj"**. Ĉu eble malsatego, simila al tiu en Ukrainio, Kazahio kaj Kubanjo furiozis en ĝi dum tiuj jaroj? Aŭ amasaj murdoj laŭ la skalo de 1937-a jaro? Nur en Ukrainio la artefarita malsatego (genocido per malsatigo!) forprenis 7 milionojn da homaj vivoj (kaj Garolo miras, ke mankas entreprenemaj homoj en la nuna Sovetio. Komprenoble, ke mankas! ja, se temas pri agrikulturo, la plej bonaj kamparanoj formortis dum tiuj jaroj!). Ĉu post tio povas esti io pli malbona??? Jes, Okcidento preferas NE SCII pri tiu malsatego, ja tio aldonus kromajn konscienciproĉojn (kaj oni jam sentas riproĉojn pri juda holokaŭsto). Mia angla kunparolanto miregis: "Kiel? Oni mortis pro la malsato en agrikultura lando, en t.n. "cerealkorbo de Eŭropo?" Jes, oni mortis. Mi ne scias, kia morto pli teruras: ĉu tiu de malsato, ĉu en gasĉambro. Sed pri ĉi tiu genocido oni preferas ne aŭdi kaj ne scii kaj ankoraŭ miras, kial mi estas tiom kontraŭkomunista kaj opinias KPSU krimulo, kiun necesas juĝi SAME kiel nazian partion en Germanio pri "krimoj kontraŭ homaro".

Multaj sovetiaj propagandistoj jam venis Okcidenton por timigi ĝin pri ontaj intertnaj bataloj, 15 atombombaj respublikoj ktp. Mi invitas Igorj el Ruslando konatiĝi kun Deklaracio pri ŝtata suvereneco de lia najbara ŝtato Ukrainio - ni ne volas atombombojn! Nek Belorusio, tere suferinta pro Ĉornobila katastrofo. Nek Latvio, Estonio kaj Litovio. Cesu do gurdi tiaĵojn. Ĉi tiuj landoj volas esti neŭtralaj. Neniu el ili sopiras esti superpotenco kaj dikti sian volon al cetera mondo. Ideo pri "Moskvo - tria Romo" estas rusa ideo. Espereble la modernaj rusoj forlasos ĝin kaj finfine komencos okupiĝi pri ordigo de sia propra lando, ne pri "Nova Pensado" nepre por la TUTA HOMARO ktp.

Sovetia imperio nepre disfalos. Kiakoste? - tiu demando turmentas min ne malpli ol vin. Ĝi povas esti pace malmuntita. Ne necesas pensi ke liberigantaj nacioj sopiras sangon, revoluciojn ktp. Baltiaj landoj klare montris sian deziron iri al sendependeco per paca vojo. Kiu kulpas pri viktimoj? Kiu sendis "nigraberetulojn" en Vilnjon kaj Rigan? Ne necesas spekulacii pri "ŝparo de homaj vivoj". Mi funebras kaj priploras ĉiujn, falintajn en teruraj januaraj tagoj en Riga kaj Vilnuso (kaj malbenas sendintojn kaj plenumintojn). En Britio miloj da homoj povis vidi dokumentan filmon de brila latva reĝisoro Juris Podnieks, kies DU bonegaj amikoj, du homoj kun kameraoj (ne pafiloj, Igorj! Vi ne povas ne scii tion!) estis murditaj de "nigraberetuloj". Dum tiuj tagoj sur barikadoj staris unu apud alia latvoj, rusoj, ukrainoj kaj alinacianoj. Mia rusa amikino el Riga (urbo, en kiu mi vivis dum sep jaroj, tre kara por mi) skribis, ke "ni iris defendi nian parlamenton". NIAN! Ja registaroj en baltiaj ŝtatoj estis elektitaj. Ili povas ne plaĉi al vi - sed tio estas elekto de koncernaj popoloj. K-don Gorbaĉov oni ne elektis en populara baloto - tion scias ĉiu. Kian rajton li havas riproĉadi ion al leĝe elektitaj gvidantoj de baltiaj ŝtatoj?

Mia kontribuo por "Laŭte!" ne estis odo. Ĝi estis sufiĉe seka prezento de kialoj: kial ukrainoj bezonas propran ŝtaton. Bv. pridiskuti ilin. Ĉu eble vi opinias ke civitanoj de Ukrainio daŭre devas soldatservi milojn da kilometroj for de sia patrolando? Ke Moskvo daŭre devas decidi kiom da atomcentraloj havu Ukrainio? Mi ŝatus vidi reagon de francoj, se morgaŭ ne Parizo, sed Bonno decidus kion konstrui en Francio, aŭ ekz. se francaj malliberuloj estos sendataj en Kanakion por punperiodo. Mi ne estas ŝtadmiranto, sed akceptas ŝtaton kiel "necesan monstron". Revi pri senŝtateco povas tiuj, kiuj jam havas sian monstron (same kiel plendi pri siaj edzoj povas nur edzinigitaj virinoj, ne virgulinaj). K-do Igorj ne povas ne scii ke multaj respublikoj de la disfalanta imperio jam subskribis ekonomiajn kontraktojn kiel egalrajtaj ŝtatoj. Kaj tio estas irenda vojo - vojo de ekonomia partnereco. Prezidanto de RSFSR Boris Jelcin elektis tiun vojon - vojon, kiu ŝparos homajn vivojn. Ne la vojo de M. Gorbaĉov kaj militista kliko kun KGB malantaŭ li, kiuj decidis per ajna

prezo (do ĝuste - per "fero kaj sango"!)) teni la kadukan, malamatan de milionoj, imperion kune. Ne necesas pensi ke gvidantoj kaj novaj partioj en uniaj respublikoj ne vidas danĝeron de limproblemoj. Ĉiu saĝa politikisto konsentas ke oni ne tuŝu ekzistantajn limojn. Ĉiu unia respubliko de USSR havas limojn - oni interkonsentu pri ilia netuŝo (kiel en la kontrakto inter Ukrainio kaj Rusio).

Ĉiuj minoritatoj devas havi rajton por sia libera evoluo. Mi ne scias, pri kiu diskriminacio de "neoriginaj popoloj" parolas Igorj. Se li pensas ke rusoj daŭre povos vivi en Latvio, ne scipovante la latvan lingvon - do TIEL ne plu estos. Kaj tio ne estas diskriminacio, sed venko de justo. Se mi loĝas en Anglio, mi parolas en vendejoj, poŝtejo, stacidomo ktp. angle. Turkaj gastlaboristoj parolas germane en Germanio kaj ne postulas ke la turka estu la oficiala ŝtata lingvo de Germanio. Rusoj komprenu ke kondukti tiel aroge imperiiste, kiel ili konduktis en kolonioj ĝis nun, ne plu eblos. Oni lernu esti membro de minoritato - aŭ veturu hejmen. Ne estas alia eliro. Tio ne estas diskriminacio! Se iu venas kaj brutale okupas vian domon, postulante krom tio ke vi parolu lian lingvon kaj nomante vian lingvon "hunda" (vidu leteron de N. Kovnator en "Sennaciulo" marto 1991), li estas okupanto kaj prave malamata (ĝuste tio okazis en 1940). Se vi rilatas estime al origina popolo kaj lernas ĝian lingvon - neniun nomos vin "okupanto" kaj nur simpatios al vi (ĉu vi neniam legis ekz. ruslingvan magazinon "Daugava", aperanta en Latvio?). Ĉu vere necesas klarigi tiom elementajn aferojn?

Jes, propra sendependa ŝtato estas valora, ĉar ĝi redonas al ekskoloniitoj homan dignon kaj eblecon mem decidi pri sorto de sia lando. Ĝi ne estas super homo, sed por homo (KIA ĝi estos - dependos de ĝiaj civitanoj).

Se vi sentas vin "sovetiano", estas via afero. Sed milionoj da homoj preferas esti "litovoj", "latvoj", "estonoj", "ukrainoj", "belorusoj" ktp. Kompreneble, por rusoj tio povas ne tiom gravi - ja finfine "la sovetia lingvo" estis nenio alia ol la rusa (kiun oni disvastigis en la mondo dank'al mono de ĉiuj nacioj de USSR), la mondo ĉiam parolis pri "rusoj" kiuj konkeris kosmon, venkis naziojn ktp. (kiun interesis ke la konstruinto de l'unuaj kosmaj ŝipoj

estis ukraino - Serhij Koroljov? Neniun. Ĉiuj atingoj de USSR iris je konto de "rusoj"). Kaj ĵus k-do Gorbaĉov diris ke "ni pensu pri nia miljara ŝtato..." - klare montrante ke la Sovetia imperio nur daŭrigis la malnovan ĉaran... Sed aliaj popoloj prave diras: "Dankon - ne! Por ni sufiĉas! Ni volas esti **egalrajtaj partneroj** kaj mem decidi pri ni."

OKSANA

Nia kriminala felietono :

* Stéphane THEBAULT, 22-jara, ne estis taŭge informita pri la funkciado de la franca leĝo pri soldatserv-rifuzo. Li iris al la kazerno, kaj tie rifuzis porti pafilon. La 6an de februaro, tribunalo en Poitiers lin kondamnis al 15-monata mallibero. Ĉar la justico ne informis lin pri la apelacia rajto, la kondamno estas nun definitiva.

Amase sendu al li kuraĝigajn leterojn !

Stéphane THEBAULT, mat. 15229, Maison d'arrêt,
209 Fg. du Pont Neuf, F 86000 POITIERS

* Thierry DALIGAULT, arestita la 20an de julio 1990, estis kondamnita la 27an de novembro al unujara mallibero pro soldatserv-rifuzo ligita al liaj konvinkoj pri mondĉivitaneco.

Thierry DALIGAULT, Maison d'arrêt, 56 bd. Cartier,
F 35031 RENNES CEDEX

Alvoko al francaj neperfortemuloj

Aktivantoj de MAN, MIR, Verduloj kaj similaj grupoj provas krei en Francio reton por progresigi neperfortan defendon. Tiuj el vi, kiujn tio interesas, povas skribi en franca lingvo al :

Collectif Dissuasion Civile
BP. 1723

F 73017 CHAMBERY CEDEX

Donacoj por la ekipado de la Muelejo :

(De post la bilanco de L'91 p.50) : D.C. 500, J.G. 100, R.C. 100, R.M. 100 P.F. 50, R.C. 90, S.A. 100, R.F. 100, H.C. 50, J.S. 80, R.R. 80.

En la nuna momento finfine loĝebligas 3 ĉambretoj sur la unua etaĝo de la muelejo. La gemuelejanoj eble baldaŭ ĝuos proprajn dormĉambrojn! Dankon al Albert kaj Jeannine!

KUNLERNI ESPERANTON
 PRAKTIKE UTILIGEBLAN
 en situacioj reale okazantaj
 en la vivo de esperantistoj,
 jen la celo, kiun ni proponas
 en Muelejo de Beauville
 okaze de la ĉi-someraj se-
 majnoj...

LETERO EL NIA MUELEJO

Tiu deziro fontas el la -
 konstato, ke la plej multaj kursoj - kaj lernolibroj - ja
 taugas por lerni la teorian esperanton, lerni vortojn, sed
 montriĝas plej ofte lamaj, kaj lamigaj, kiam la lernantoj
 troviĝas en realaj situacioj.

Ne eblas, por esperanto, imiti la konversaciajn gvid-
 librojn nacilingvaj, kiuj ekzemple listigas la eventualajn
 demandojn kaj respondojn fareblajn en diversaj butikoj,
 ĉe giĉetoj, restoracioj ktp. Preskaŭ neniam ni, esperant-
 istoj, havos okazon eniri butikon aŭ oficejon, kies deĵor-
 anto scipovas esperanton. Male, esperantistoj rilatas kun
 aliaj esperantistoj en specifaj cirkonstancoj (en kunvenoj,
 en kongresoj, telefone, letere, kaj en la nun multigiĝantaj
 "restadejoj", kie eblas kunvivi pli nature ol en oficialaj
 kongresoj). Necesus do, ke la komencantoj plejeble frue
 enkapigu frazojn, esprimojn de vivanta esperanto respon-
 dantaj tiujn situaciojn : sin prezenti, pridemandi la no-
 van konaton, peti kaj doni informojn telefone, ktp...

Ni devus do noti kiel eble plej multajn el tiuj eblaj
 situacioj kaj - ekzemple per lernotaj skeĉoj - lerni kiel...
 elturniĝi.

Ni invitas ĉiujn interesatojn (lernemulojn kaj ĝenerale
 personojn dezirantaj animi konversaciajn kursojn) kun-
 labori kun ni por starigi tian "kurson" kiu, eble slip-
 forme, povus esti eldonata.

Kribo

Memorige, (vd. la martan **Laŭte!**) la restadoj jam propon-
 ataj en la Muelejo, ĉi-somere :

- * **8an de julio/14an de julio** : E-kursoj diversnivelaj.
- * **29an de julio/4an de aŭgusto** : Por lerni esperanton
 praktike utiligeblan (vd. ĉi-supre!)
- * **5an de aŭg./12an de aŭgusto** : Ĉu vi ŝatas rakontojn?
- * **13an de aŭg./20an de aŭgusto** : Libera restado
 Avertu frue pri la de vi preferata periodo! Dankon!



ĈE LA MONDCIVITANOJ

De la 21a ĝis la 28a de julio, en "Château de La Lambertie",
 F-33220 PINEUILH, okazos la 14a sesio de la Instituto de Tutmond-
 istaj Studoj. Temo : **La Eŭropo de la Civitanoj**. En 8 tagoj dude-
 ko da prelegoj sekvataj de debato (tri en esperanto) pritraktos
 diversajn aspektojn de la temo.

Aliĝo: 50 FF tage aŭ 250 FF por la tuta sesio.

Manĝoj: 90 FF tage (70 por la studentoj).

Eblas tendumi surloke aŭ rezervigi ĉambron en hotelo de Ste Foy
 la Grande. Pliajn informojn petu, en la franca lingvo, de :

Isabelle HANNEQUART, F 36500 SAINT LACTENSIN (tel: 54 84 00 06)

BAHAA ESPERANTO-LIGO

aranĝos seminarion de la 22a ĝis la 26a de majo en Bjalistoko por
 konatiĝi kun aŭ profundiĝi pri la Bahaa religio, kleriĝi je la
 apliko de bahaaj principoj al aktualaj mondaj problemoj kaj por
 la persona vivo, interamikiĝi, distriĝi, festi, gajadi...

Petu invitilon de : Fondumo Esperanto, ul. Lipova 14, S.P.67

PL - 15091 BIALYSTOK

EN ARIEĜAJ PIRENEOJ

JORGOS kunlabore kun diversaj asocioj invitas vin al Esperanto-
 Staĝo (+ festoj, kunvenoj, ekskursoj, umadoj...) de la 25a de majo
 ĝis la 2a de junio en Feriejo La Freychède, F-09300 MONTFERRIER
 Komencantoj eklernos per Ĉe-metodo kun Carla de LORENZI el Torino,
 progresantoj forumos diversstile kun Dimitar TERZIEV el Sofia,
 E-spertuloj esploros natur-temojn kun Luigi BARBANA el Gorizia.
 Petu informojn kaj aliĝilon de : MJC ESPERANTO ĉe E. LASSERRE
 8 rue des Ecoles, F 09600 LAROQUE D'OLMES

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj E-librojn kun ĉiuj landoj :
 Stojĉo CANKOV p.k. 208, BG 7000 RUSE, Bulgario.

JE LA MALKOVRO DE LA ROMANIKA POITOU

De la 23a ĝis la 29a de junio, ni stele migros (proks. 15 km) ekde LA KVINPETALO en BOURESSE. Praktikadi esperanton por la esperantistoj, informiĝi, iniciĝi kaj samtempe malkovri la famajn abatejojn de Saint-Benoît, Nouaillé, Civaux, Chauvigny, Poitiers, celas tiu restado.

Petu pliajn informojn kaj aliĝilon de : GINETTE GABILLON,
32 rue Renault, F-33200 BORDEAUX CAUDERAN. Tel 56.02.68.65

Ĝus aperis la tria eldono de **Proverbaro Franca-Esperanta** + **Esprimoj sankciitaj de l'uzado**

Jen do denove kompleta la trilogio de Lucien BOURGOIS, kiu, kun **Laŭ la fluo...** kaj **Esprimaro F/E**, disponigas al la francaj lernemuloj de esperanto la rimedon malkovri sub esperanta vesto grandan kvanton da tipe franclingvaj esprimoj.

La nova eldono, 76-paĝa, estas parte rebakita kaj cifersistemo faciligas la uzadon.

Mendkodo PF, vendoprezio : 20 FF

(20-procenta rabato ekde-5-ekzemplera mendo)

Memorige : **Laŭ la fluo...** (FI) 10 FF

Esprimaro F/E (FE) 45 FF

En la venonta numero de L! vi trovos eseon de Mark FETTES, redaktoro de la UEA-revuo **Esperanto** :

"Al unu lingvo por Eŭropo?"

La estonteco de la eŭropa Babelo"

Ĝi estos disponebla ankaŭ kiel aparta broŝuro kun la mendkodo AU, vendoprezio : 5 FF, kaj povos akompani la samteman kasedon mendeblan ĉe la libroservo de SAT-Amikaro : B. SCHNEIDER, 38 av. de la République, F 94320 THIAIS.

Kribo



Kunveturado al orienta Eŭropo somere de 1991 :

Sep geamikoj el TURO serĉas urĝe por la someraj ferioj de 1991 por vojaĝo per minibuso (proksimume 6500 km.) :

TURO - La Chaux de Fonds - Konstanco lago - Innsbruck - PRAGO - Brno - VIENO - BUDAPEŝTO - Timisoara - SOFIO - Jugoslavio - Venecio - Briançon

unu paron (geedzan aŭ ne) aŭ 2 personojn simpatiajn, ne snobojn, preferinde esperantistojn, 25/50-jarajn.

Forveturo de TURO : mardon la 23an de julio, matene.

Reveno en TURO : sabaton la 17an de aŭgusto, vespere.

Loĝado : tendaro, kaj/aŭ (laŭ eblecoj) ĉe esperantistaj korespondantoj. Kosto por ĉiu : proksimume 5000 FF (en tiu sumo, 2300 FF por la transporto).

La interesatoj povas loĝi en Turo, Vierzono, Bourges, Ĵuraso aŭ aliaj regionoj, se ili devontiĝos atingi Turon proprarimede por la komenco de la vojaĝo.

Kontaktu : S-ron Claude TELLIER, 7 place Ingres, F-37200 TOURS
Tel. 47.28.44.30

LASTMOMENTAJ INFORMOJ (Ĉu interesatoj ricevos ilin ne tro malfrue???)

Maja renkontiĝo "Ĉe la Vojnodo"

la 4an kaj 5an de majo 1991

Adreso : Moulin de l'Hermeton, Route de Givet 68
B-5540 Hastière-Lavaux. Tel : (082) 64 49 86
aŭ (081) 21 01 02

Programo : Sabatè matene, akceptado, vizito de la muelejo kaj ĉirkaŭaĵo. Posttagmeze : Prelego de E. de Zilah : **Elementoj el Sikhaj kulturo kaj historio**. Konversacio, gramatikaĵoj por la progresantoj. Kurso por komencantoj. Diversaj aktivecoj por la infanoj.

Sabaton vespere : Verk-ludoj kun Gilles Hutereau. La spégulo de Velodajo.

Dimanĉe matene : Verkludoj (daŭrigo). Ludoj novaj kun Gilen Tilleux. Posttagmeze : Kino kaj esperanto (video-bendo). Ludoj novaj. Je la 17a : recitalo de **Nikolin'**.

Renkontiĝo de gejunuloj simpatiantaj al Esperanto en Muelejo de Beauville, la 8an kaj 9an de majo.

La aranĝon prizorgas la grupo de Mont de Marsan, Ĝirondianoj, k.a. Bonvenon al tiuj, kiuj emos viziti la muelejon tiuokaze!
Laŭeble telefone avertu al : 53. 95. 40. 26, ke vi alvenos...

Alia recenzo pri

Paul Berthelot

LA EVANGELIO DE LA HORO

Maldika broŝuro, sed tre densa. En kelkaj paĝoj, en formo de paraboloj imite al la kristanaj evangelioj, Berthelot tre komplete prezentis la ideojn elvolvitajn de anarkistaj pensuloj kiel Elisée Reclus, Kropotkin kc : alterno de evoluado/revolucioj, interhelpo, forigo de trudaj leĝoj kaj de hipokrita moralo, spontana organizo de harmonia socio surbaze de individua memstareco... En sagaca resuma prezento Gilbert Ledon analizas ĉapitron post ĉapitro.

La "homo", speco de moderna profeto, anoncas la Horon, kiu evidente ne estas tre baldaŭ venonta. Kiel la Jesuo de la Evangelioj, tiu stranga profeto, tro frue prava, fine estos mortigita, viktimo de la obtuza amaso manipolata de la mastroj ekonomiaj, politikaj, religiaj.

Leginte tiun elstaran verkon, oni malfacile povas kredi, ke ĝia aŭtoro finiĝis en monaĥejo kiel pia katoliko. Ĉu do mensogo de kleriko? Akceptebla hipotezo. Sed la mala ne estas nepre forĵetenda. Berthelot ne estus la unua kaj sola liberpensulo, kiu tiel finis sian vivon. Malsano, korpa malfortiĝo, eble eĉ febra deliro, kune kun dankemo al la monaĥoj, kiuj zorge kaj sindoneme flegis lin, povas estigi tian mallogikan retroevoluon. Ĉiel ajn, dum li estis almenaŭ mense sana, Berthelot en sia verketo aspektas plene liberiginta el ĉia religia kaj socia konformismo. Liaj paraboloj, ĉiam proponante konkretajn ekzemplojn, tre klare esprimas lian fortikan liberan penson.

Ĉiu amanto de libera penso kaj de konscia esprimo nepre legu kaj meditu ĝin.

Valo

"La Evangelio de la Horo" estas havebla ĉe SAT-Broŝurservo : 10 FF.

La ŝvitanta eldonanto strebis aperigi tiun ĉi numeron iom pli frue por anonci aranĝojn okazontajn komence de majo (vd. antaŭlastan paĝon). Same, ankaŭ la julia numero espereble povos aperi meze de junio por anonci juliajn kaj aŭgustajn aranĝojn.

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47470 Beauville. CPPAP 58651